



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

Ĉe la Komenco de la Jaro 1914.

Forpuŝas nun la nova jaro la antaŭan de estado: la meznokto ne nur estas la divido de du tagoj, sed la disigo de du jaroj: la morto de la antaŭa, la nasko de nova.

Iru do nun, kara al ni Gazeto, iru do tra la mondo kaj bonvolu diri al ĉiuj vin legontoj niajn bondezirojn por ili: la beno de Dio venu sur ilia menso kaj ilia koro, sur ilia animfakultoj kaj ilia korpaj kapablecoj, sur iliaj personoj kaj iliaj gekaroj.

Ankaŭ sur vi, *Espero Katolika*, venu Dia Benoj. Elparolata vorto nur trafas la aŭdintojn: skribita vorto en landlingva idiomato nur la landlingvon konantojn trafas: sed en vi skribitaj ideoj iros tra la vasta mondkampo, trafantaj homojn de ĉiu lando, de iu ajn lingvo: per Dia benoj bonege faru vian taskan!

Vi, *Espero Katolika*, estas kiel la vento, kiu prenis la semerojn kaj en siaj flugiloj transportas ilin ien, kien Dia volo ilin kondukas: Vin do, kiel Daniel invitis ĉiujn ventojn beni, t. e. glori kaj danki, la sinjoron Dion de niaj patroj, Vin do mi invitu ankaŭ beni la Dian Moŝton! Prenu la bonajn ideojn de ĉiuj fervoraj esperantistaj Katolikoj kaj tra-semu en la tuta mondo: alportu al ni kaj al ĉiuj abonantoj semojn de laboremeco, de imitinda agado, mon-

tritaj en iu ajn mondparto, por ke legontoj vidu kaj imitu kaj gloru la Patron, kiu estas en la Ĉielo. Ke per Vi en tiu-ĉi jaro estu vekita ĉie pli da fervoro por nia sankta duobla afero: esperantismo kaj katolikismo. Per vi radiu la Vero ĉiam plu; per Vi la lumo de nia kredo penetru ĉiam pli profunde ĉien, kie ankoraŭ estas mallumeco kaj kie la popoloj ankoraŭ sidas en la noktaj ombroj de peko kaj eraro!

Dio nia favorigu la redaktoron kaj ŝiajn helpantojn! Ke ne homaĉaj sentoj reĝu ilin, sed la pura spirito de Kristana amo: nur la pura deziro bonfari, kaj divastigi la dian verkon: tiamaniere, kiel oficiala organo de I.K.U.E., nia *Espero Katolika* provizos al tiu ŝatata Ligo fratan interŝanĝon de ideoj kaj projektoj: apogos la internan ideon de tiu Unuiĝo kaj la eksteran konstruon.

Vi do, legantaro nia, preĝu por nia sukceso en tiu-ĉi jaro kaj bonvolu preĝi ankaŭ por la religia Direktoro, kiu volonte promesas preĝi por vi en la Sankta Meso.

Lambert J. J. M. POELL.
Sacerd.

La Katolika Vero.

Kiel la lumo de la suno, estas la potenco de la Katolika Vero. Ĝi estas ĉie, ĝi ne lasas sin fornei. De ĝi eliras ĉia vivo. Kaj tamen iu, kiu nur dumnokte promenas aŭ volas loĝi nur en kavernoj, povas nei la sunon.

La potenco de la Katolika Vero estas kiel la leĝoj de la logiko kaj matematiko. Ili estas la fundamento de ĉiu pensado. Oni tute ne povas forpensigi ilin. Kaj tamen ja ekzistis filosofoj, kiuj estis dubantaj pri tio, ĉu la Jes ĉiam kaj ĉie estas Jes, la Ne ĉiam kaj ĉie estas Ne, ĉu dufoje du ĉiam kaj ĉie devas esti kvar.

La potenco de la Katolika Vero estas kiel la vivo de ĉia kreito, kiu alkroĉiĝas al la vivo kaj abomenas la destrui. Kaj tamen ekzistas memmortigantoj, kiuj volas forkuri de la vivo.

La potenco de la Katolika Vero estas kiel la potenco de la amo, kiu ĉion interligigas, kiu ĉiujn faras fratoj, ĉiujn filoj de Dio. Kaj tamen ekzistas mortigantaj kaj procentegistoj.

La Katolika Vero estas ununuro kaj ĉio. Ekzistas nenio ekster ĝi. Tute nenio ajn. Kio ĝi ne estas, tio ekzistas nur en la neado. Sed ja, la suno povas malaperi malantaŭ nuboj kaj montoj. La Vero povas mutiĝi kiel profunda enigmo por arogantaj esplorantoj. La vivo povas malsaniĝi. La amo povas malvarmiĝi.

La potenco de la Katolika Vero estas tia, ke ĝi devas estriĝi same la plejsaĝulon kaj plejklerulon kiel ankaŭ la infanan intelekton. Ĝi klare montriĝas eĉ al la blindulo, kaj al la surdulo. Ja tiu, kiu ne volas vidi kaj ne volas aŭdi, tiu estas ankoraŭ pli blinda ol blinda, pli surda ol surda. De li senefike resaltas la radio de la vero.

La potenco de la Katolika Vero kuŝas en la vero mem, ne en la polvo, kiu ĉirkaŭ ĝi pendas en la aero kaj fiksas sin sur ĝia supraĵo. „Kiel belega preĝejo!” ekkrias la rigardanto entuziasmigita per la beleco. „Kiel kovrita de polvo kaj rusto!” krias la grumblanto blinda por la beleco.

La potenco de la Katolika Vero aperas tute simple kaj senbrile kiel ĉio granda, sen afiŝoj, sen altrudo, sen reklamo, sen komerco. Tiel gemonduloj diras pri ĝi: „kie do ĝi estas? Oni ne vidas ĝin. Oni ne sentas ĝin. Ĝi estas ne-efikema. Ĝi estas iluzio. Oni ne povas komerci per ĝi” (multaj tamen provas tion).

La Katolika Vero estas la mistero de la mondkreado depost eterne. Ĝi ne estas, kiel opinias malprofundaj liberpensuloj, la eltrovaĵo de malriĉa, stranga hebrea rabeno. Ĝi ne estas kiel opinias la Protestantoj, mallarĝa sistemo teologia. La tuta mondo, la ĉielo kaj la tero estas nature katolikaj. Ĉio, kio en la historio kaj en popolvivo estas bona, bela kaj vera tiel estas tial, ke ĝi partoprenas je la Katolika Vero.

La Katolika Vero estas la plej homamika potenco, tolerema, malsevera, komprenanta, pardonanta, elaĉetanta, konsolanta, fortiganta, edukanta. Ĝi estas la potenco de la ĝojo, ĝi estas la gajiga anoncaĵo. Ĝi estas la plifaciligado

de ĉiu jugo, la moderigo de la maldolĉeco de l' ekzistad-batalo. Ĝi ne donas ordonojn, se ne por feliĉigi. La ordonanto en ĝia senco estas la servisto de ĉiuj, la servisto de ĉiuj servistoj de Dio. Dio mem fariĝis en ĝi servisto de ĉiuj, montrante sian estrecon en la simbola servado de la piedlavado. La Dio de la Katolika Vero estas la Patro, kiu ĉion, ĉion lasas preĝpeti de si, kiu ĉiujn, ĉiujn invitas tre multe kaj senĉese preĝpeti al si — prefere kun intensesco kaj konfido, ol kun modesta malvarmeco kaj dubo.

La paradizo, la vera paradizo ne estas perdita, ĝi ne estas barita kaj nealirebla. Ĝi estas regajnta, ĝi estas malfermita por libera enirado. Ĝi estas la Katolika Vero kun tuta sia potenco supernatura. Tie ĉi leviĝas la arbo de la vivo kun siaj senmortec-fruktoj. Tie ĉi en la senco de Dio, en la senco de la amanta Patro ĉiu povas fariĝi disimila, laŭmodela de Dio, kunĝuanta lian Diecon.

Sed la Katolika Vero ne nur donas konsolojn pro la ĉielo, kiel oni false riproĉas al ĝi. Ĝi efektivigis en la Eklezio potencoplenan idealregnon, regnon de sociala justeco, kiun la katolika ŝtato kompletigante apogadu.

Tuta tasko de la mondhistorio estas la realigado de tiu ĉi idealregno. Kaj nenia generacio de la mondhistorio pli-energie estas celanta tiun ĉi realigon per la Katolika Vero, ol nia nuntempa generacio.

Tio do estas nia laborkampo, nia daŭra celo.

Verkis RICHARD VON KRALIK.

Esperantigis,
K. BUXBAŬM.

UNUECO KAJ ĜENERALECO de la Eklezio de Kristo.

Kvazaŭ kiel antaŭparolo al diversaj sube presitaj artikoloj, jen sekvas kelkaj citaĵoj el konata verko de la anglikana konvertito Charles Stanton DEVAS (1848—1906), *The key to the world's progress*, de kies dua parto aperis nederlanda traduko de P-ro P. VAN DEN TEMPEL, O. P., eldonita de la Apologia Societo „Petrus Canisius”. La tradukinto komparas la verkon de DEVAS kun la

ĉefverkoj de S. AUGUSTINO, BOSSUET, CHATEAUBRIAND, NEWMAN kaj KURTH. Efektive la genia kaj rimarkinda verko meritas esti diskonigita, pro kio mi tradukis el ĝi por nia Revuo kelkajn paĝojn, disajn tra la verko, sed samtempe taŭgajn kiel enkonduka artikolo por la sekvantaj.

D-ro SMULDERS.

Providencaj profitoj de herezo kaj skismo. —
Mizerikorda Providenco permesis al ni, kompreni iomete la celon, pro kio tiu malbono estas allasita, kaj ĝian preskaŭ nerifuzeblan neceson por favori la vivon kaj la forton de tiu sama Eklezio, kontraŭ kiu ĝi sin turnas,

Neniam la laboro de la homo tiel videble estis regita de la influo de la Providenco. Neniam venkitoj pli intense laboris, por elkonstrui la murojn de fortikaĵo aŭ palaco por siaj venkintoj, aŭ tiuj ĉi ribeluloj, kontraŭvole laborante por starigi la murojn de la nova Jeruzalemo, de la intelekta templo de Dio. La Kristana Doktrino ne estis proponita jam de la komenco en sia tuta evolucio kaj pleneco, tiel ke herezo kaj skismo ne pli trovu lokon. Precize per siaj kontraŭdiroj tiuj du ambaŭ servis por evoluciigi la konsekvencojn de la Katolika teologio, same kiel ilia kontraŭstaro kontraŭ iuj veroj kontribuis por evidentigi la gravecon de tiuj veroj. Tiamaniere la veroj unu post alia prezentis sin kaj envicigis sin en perfekta ordo. La diversaj regionoj sur la kampo de la Kristana Doktrino laŭvice, kvazaŭ per supernatura lumigilo, estas traesploritaj, kaj la grandaj dogmoj, kiel: la deeterna naskigo de la Vorto; la Kristo: la efektiveco de Lia Sankta homeco, la unueco de Lia persono, la dueco de Lia naturo, la ekzisto de Lia animo, Liaj du volo; la efektiva Ĉeestado en la Sanktega Sakramento: la gloro de Mario pro ŝia dia Filo; — unu post alia estas klarigitaj plenlume je la ĝusta momento. ¹⁾

¹⁾ NEWMAN, Discourses to Mixed Congregations, XVII; FABER, Blessed Sakrament, III, § IV. Do ne estas estigitaj novaj dogmoj dum la jarcentoj, sed ili estas proponitaj pli klare al la fideluloj, formulitaj pli precize kaj klarigitaj en ĉiuj siaj konsekvencoj, kaj tio okazis ofte kaŭze de la kontraŭbatalo de la herezuloj.

Pro tio tre prave diris S. Aŭgustino: „neniu estus eltrovinta, ĉar neniu estus pridiskutinta, se ne devigita per la batoj de la eraro. Ĉar la eraro de la herezuloj estas ja la skandalo por la malgranduloj sed la vero ne estus serĉita kun tiom da fervoro, se ĝi ne havis malamikojn, kiuj al ĝi kontraŭmetis la mensogon.” Tiel Theodoro de MOPSUESTE, Julio de ECLANUM, KALVINO kaj STRAUS estis utilaj. Kapabla kontraŭulo, sincera en sia eraro kaj lerta por defendi ĝin, estas, en efektiveco, bonfaro por la religio. La grandeco de la eraro estas la mezurilo de la triumfo de la vero. La intelektaj armiloj, kiuj servis por ataki la doktrinon de la Eklezio, ekzistigas por ĝi la trofeon de la venko. Ĉiuj ĝiaj bataloj estas defendaj, sed ĉiuj finiĝas per venko.

Herezo kaj skismo estas do iamaniere vivo-kondiĉo por la Eklezio ²⁾, kaj al ĉiu el tiuj ĉi ŝajne tiel ne bonvenaj enŝoviĝantoj la historio scias almontri lokon kaj kialon de ekzistado.

*
*
*

Abomeno de la Eklezio al divideco. — Inter ĉiuj karaktertraĵoj de la Eklezio, la unueco estas la plej grava kaj plej nobla. En Sia solena kaj energia preĝo la Kristo montrosiigas la unuecon kiel la konilon kaj la decidigan pruvon por la diaeco de Sia Institucio: „Mi preĝas por ili, kiuj kredas en Mi, por ke ili estu unu, tiel kiel Vi, Mia Patro, estas en Mi kaj Mi en Vi; por ke ili estu ankaŭ unu en Ni, kaj por ke la mondo kredu, ke Vi sendis Min.” Kaj la Apostolo, enkatenigita, admonas siajn konvertitojn, restadi fidelaj al ilia elektiteco, kune konsisti el nur unu koro kaj unu animo, kiel decas al tiuj, kiuj konfesas unu solan kaj unu saman esperon, unu solan kaj saman Sinjoron, unu solan kaj saman kredon, unu solan kaj saman bapton, unu solan kaj saman Patron de ĉiuj. Tio do estas la fundamenta kaj neŝanĝebla principo:

²⁾ Tiu paradoksa tezo devas esti komprenita en suprepriskribita senco, ke herezo kaj skismo ofte estas motivo por la plua evoluciado de la Vivo de l' Eklezio.

ne povas ekzisti du Eklezioj kaj du Kristoj; du ŝafaroj kaj du paŝtistoj; unueco estas leĝo.

Pro tio do, ke la unueco estas la sigelo de la diaeco, ne estas mirinde, ke la fideluloj kun abomeno kaj kiel kulpajn al grava eraro konsideris tiujn, kiuj forlasis la rektan vojon de l' unueco kaj de l' obeemo, por krei al si propran doktrinon kaj aŭtoritaton. Ŝajnis al ili, kvazaŭ tiuj ĉi intence estingis la sunlumon al la ĉielo. Ankaŭ oni montris ilin kiel servistojn de satano kaj oni donis al ili la plej akrajn nomiĝojn, kiel atestas la Skriboj ³⁾. Ili ja estis tiuj, kiuj detruis la, de la Dia Providenco en Lia institucio starigitan ordon, en kiu oni devus rekoni Lian manon; kaj per malklarigado de la lumo de l' unusola Peranto, ili malklarigis la pruvon por la unueco de Dio mem. Ili klopodis dispartigi kaj disŝirigi la mistikan korpon de Kristo, ĉar tia ja estas la Eklezio, kies kapo estas Kristo.

En niaj tagoj estas malfacile por ĝuste kompreni la abomenon, kiun sentis la unuaj Kristanoj por la herezo kaj la skismo. La supernaturaj donoj (*Charismata*), kiuj fluis tiel abunde en la primitiva Eklezio, jam delonge malaperis; ni estas kutimigitaj al la vidaĵo de multnombraj asocioj de herezuloj kaj skismuloj; la dispartiĝo faŝiĝis ĝenerale fenomeno de heredeco; nur en la malplimulto da kazoj ĝi estas persona ago.

Oftece ni estas atestantoj de la pia vivo kaj de la bonaj faroj de niaj disiĝantaj fratoj: pro tio ni havas kun ia sento de dankemo la esperon, ke tiuj multaj estas alligitaj al la Eklezio almenaŭ ankoraŭ per nevideblaj ligiloj. Tamen la propravola kaj formala deŝiro de la unueco de l' Eklezio restas en niaj tagoj la sama, kia ĝi estis en la estinto, kaj neniam la Eklezio ĉesas kaj ankaŭ neniam ĉesos kondamni ilin, kiuj ekzistigas aŭ apogas ĝin.

Oni tamen bone pripensu, ke apartenas nur al la Ekle-

³⁾ II Corinth. XI, 13, 15; Galat. I, 9; I Tim. I, 10, 11, 19, 20 kaj IV, 1, 2; II Tim. II, 16 kaj III, 8, 13; II Petr. II, 1, 3, 10; II Joan. VII; Jud. 8, 12, 13.

zio kaj al neniu alia, nur al ĝia aŭtoritata voĉo kaj al neniu alia, eldiri la kondamnan juĝon. Al neniu infano de l' Eklezio estas permesita propraŭtoritate kulpigi siajn fra-tojn pri eraro, kulpa blindiĝo aŭ diabla trompiĝo. ⁴⁾

*
* *

La kaŭzoj Plej ofte oni konstatas deflankiĝo de la ora „meza vojo”, kiu ĉiam karakterizas la Eklezion. La hereza menso plej ofte tombas en unu aŭ alia ekstr-emaĵo. En la praktiko ĝi kliniĝas al la trosevereco aŭ la malsevereco. En la teorie ĝi apogas sin tro multe sur kelkaj doktrineroj, ne sufiĉe sur aliaj. „La herezeco estas proksimume priskribebbla jene, ke parton de la vero ĝi faras tuta kaj eksklusiva vero kaj fundamento de nova kredo” (Newman), tiel kripligante kaj tion, kion ĝi konservas, kaj tion, kion ĝi forĵetas, ĉar same la unu kiel la alia estas necese por la reciproka kompreno. Estas kiel unu vid-punkto, prenita por tuta panoramo, kvazaŭ iu de la tuto apartigita parto ne estus nekomprenebla en si mem. Tiel la respektindaj doktrinoj de la Kristana Kredo estas deformitaj milmaniere. Ĉiuj malfortecoj de nia peka naturo, ĉiuj niaj tiel multnombraj pasioj, ĉiuj niaj diversaj ideoj povas kiel tiom da falsaj speguloj, reflekti la Kristanan veron. Ĉiu homo pli, malpli havas inklinon al herezo, en tiu grado, je kiu la spiritaj veroj riskus renkonti kontraŭstaron en unu aŭ alia parto de lia individueco; tiel ke animkuracisto, havanta klarvidantan rigardon, povus antaŭdiri ne tiel la falon, kiel — se ĝi okazus — ĝian direkton. Tiun ĉi karakterizan inklinon de individuoj al iu, kun ilia karaktero konforma, malbono, oni povas retrovi en la homaj grupiĝoj kaj ĝi estas la kaŭzo, ke kelkaj punktoj de doktrino aŭ disciplino estas ne aŭ malpli alireblaj por kelkaj popoloj, je certaj epokoj de ilia evolucio. Cetere pro sia malfeliĉa

⁴⁾ Papo Pio IX deklaris en sia Alparolado de Dec. 1854, kiel „oni devas akcepti kiel certe, ke tiuj, kiuj vivas en nevenkebla nescio pri la vera Kredo, ne estas kulpaj pro tio en la okuloj de Dio. Cetere, kiu kuraĝus starigi la limojn de tiu ĉi nescieco, atente la karakteron kaj la diversecon de la popoloj, landoj, de la spiritstato kaj de tiom da aliaj cirkonstancoj.”

antagonismo (kontraŭeco), pro siaj reciprokaj malŝato kaj antipatio, la diversaj naciecoj estas unu el la precipaj malhelpaĵoj por la disvastiĝo de l' Evangelio, danĝero por la religia unueco kaj ofte la kreo de herezo aŭ skismo havis kiel bazon la defendon de unu nacieco kontraŭ alia, kiu estis objekto de malŝato, envio aŭ malamo. Tiel la Koptoj kontraŭ la Grekoj, la Bizantanoj kontraŭ la Frankoj, la Rusoj kontraŭ la Poloj k.t.p.

* *

Naciismo kaj Kristanismo. — La antitezo inter Eklezio kaj Ŝtato devenas el du karaktertraĵoj, propraj al la unuenomita: ĝia kosmopolitismo kaj ĝia aŭtokratio. Ĝi estas kaj internacia kaj sendependa.

De la komenco la Eklezio estis vokita por forigi la barilon, kiu disigis hebreon de pagano, grekon de barbaro, romanon de skito. Per tio tamen ĝi naskis konflikton kun la plej fortaj sentoj de la natura homo; la naciismo . . . Ve! la mondo estas ja tro plena je profunda nacia antagonismo. Ne ekzistas lando, ĉu granda ĉu malgranda, kiu de devas suferi pro la diferenco de lingvo aŭ koloro, eksteraj kaj neforigeblaj diferencsignoj, kiujn oni per homa, jes, kelkfoje per nehoma malvirtigo servigas al la disigado de tiuj, kiuj devas esti fratoj en Kristo.

Tian dividitecon tamen la Eklezio ne povas aprobi kaj ĝi devas, kiel ĉiun alian malhumilecon, ankaŭ kondamni la nacian fieregecon. Ĝi citas la vortojn de la Evangelio: „la lastaj estos la unuaj, kaj la unuaj estos la lastaj.” El sia propra historia ĝi scias kaj instruas nin, ke, kvankam iaj privilegiitaj landoj kaj popoloj dum iu epoko povas esti konsiderataj kiel ĝia speciala kampo kaj favorita loĝejo, tiu ĉi privilegio ne ĉiam estas daŭra, sed ke ĝi, per imponanta kaj neesplorebla dispono de la Providenco, povas transiri al aliaj. Kaj anstataŭ ol esti legita al generacio aŭ loko, la Eklezio staras, kiel nova nacieco, super la naciecoj de registaro, geografia dispartiĝo aŭ parenceco, kiel popolo de ĉiela deveno, kun sia nelimigita teritorio, sia videbla estraro kaj sia ĉien sin etdanta juĝopovo.

Sed precize tiu ĉi ĝeneraleco, kiu gardas la Eklezion

kontraŭ tio, ke unu aŭ alia nacieco ĝin kvazaŭ alproprigus kaj volus limigi per *siaj* ideoj, *siaj* vidpunktoj, *siaj* antaŭjuĝoj, senĉese elmitas la Eklezion al la danĝero, ke ĝi estu konsiderata de ĉiuj kiel fremdulo. Sed ĝi ne povas esti nacia pro tio ke ĝi estas ĝenerala, kaj ĝia alta karaktero kiel la unu sankta Katolika Eklezio, le Fiancino kaj la mistera korpo de la unu Kristo, igas la ideon de nacia Katolika Eklezio kontraŭdiro en la terminoj mem (*contradictio in terminis*).

Sed ĉu la nacieco devas esti flankenmetita kaj ĉu ĉiuj popoloj sammaniere pritraktitaj? Certege ne! Tio estus neado de la diferenco, kiun la Providenco starigis inter la diversaj popoloj, de kiuj ĉiu, laŭ ĝia propra speciala karaktero, devas kontribui al la gloro de Dio . . . La Eklezio, kaj ja ĉar ĝi estas iusence eksterlandulo por ĉiuj popoloj, estas, en efektiveco, por neniu el ĉiuj fremda. Ĝi portas en si ne nur la ĝeneralan gracon, necesan por ĉiuj, sed ankaŭ la specialan gracon, necesan por la speciala formo de malboniĝo, kiu superregas en la natura karaktero de ĉiu popolo. Ĝi scipovas por tiel diri, kvazaŭ el ĝenerala fonto, administri laŭ ĉies diversa bezono. Unueco estas ĝia konilo, unuigo ĝia penado. Laŭnature la membroj de la Eklezio ne estas unu kaj tion eĉ ne volus esti. En la kredveroj tamen, en iliaj religiaj kutimaj kaj moralaj ideoj, la Eklezio faras ilin unu . . .

UNUIĜO DE LA DISIĜANTOJ.

Parolado dum „Nia Kvara” en Romo.

Tre malsamaj estas la spertoj de konvertitoj el Anglikanismo.

Pri tiu demando neeble estas al iu paroli por la alia. La Dia graco efikis en ĉiu okazo diversmaniere. Al ĉiu alvenis ia propra malĝojo. Ĉiun refortigis speciala beno.

La neofitoj elvokiĝis el dubo kaj hezitado en la klaran kaj plenan lumon de la sola vera Eklezio. Por multaj,

tamen, korŝira estis la krizo, ĉar disrompiĝis malnovaj kaj dolĉaj rilatoj; forlasotaj estis karaj memoroj el infaneco. Kaj pli doloriga ol ĉio alia estis la ruiniĝo de ilia plej alta idealo en la vivo.

Ĉe pluraj, restis profunda kaj dolora amo al la antaŭa religia hejmo, el kiu nur la forto de la Vero ilin forpelis.

Oni tamen ne vidu en tiuj doloraj sentoj ian bedaŭron. Reiro al la antaŭa kredo estas neebbla. Neebla, ĉar la Vero ĝin malpermesas. Neebla, ĉar tio estus senigo je veraj, vivdonantaj sakramentoj. Neebla, ĉar estus peko kontraŭ la Dia graco, kiu nin alvokis.

Estas tute nature, ke ni, konvertitoj, konsideru kun ia amo kaj simpatio tiun institucion, en kiu ni unue lernis koni kaj fidi nian Redemptoron. Spite la fundamentaj difektoj de tiu institucio, kaŭzitaj de la ŝismo, spite la pereiga influo de herezo, la Anglikanoj posedas proprajn, al ili specialajn trezorojn; ekz. belaj kolektoj de himnoj. Ĉar la Anglikana religia vivo estas iel frukto de la angla pens-maniero.

Ĉiu ŝismo okazigas pardon por tiuj, kiuj sin apartigas, same kiel por la Eklezio, kiu perdas tiujn infanojn.

Kompreneble la Eklezio pro ŝismoj ne pereos, ĉar ĝi posedas la Diajn promesojn, — sed la Eklezio suferas; ĝia riĉeco, ĝia karakterdiverseco malpliigas.

Tiuj specialaj ecoj de la Angloj ornamus la Katolikan Eklezion, se ŝismo ne disrompus tiun belan parton de la Templo de DIO.

La Eklezio, kiel la Nova Jerusalemo, estas la vera depo-nejo de la tuta gloro kaj honoro de la nacioj, — de ĉiu nacio en la mondo. „Afferent gloriam, et honorem gentium in illam”. (Apoc. XXI, 26). La gloro de la Eklezio konsistas el la kunigitaj gloroj de la popoloj, ĝiaj meritoj estas la kunigitaj meritoj de ĉiuj sanktuloj, kaj el tiuj trezoroj partoprenas ĉiu eĉ plej simpla fidelulo. La Katolika Eklezio nur ricevas bonojn de ĉiu, por ke ĝi disdonu al ĉiuj, tiel plenumante spirite tion, kion la apostoloj praktikis ankaŭ materiale:

„Omnes etiam qui credebant erant pariter et habebant omnia communia”. (Akt. II, 44).

Ĉia do lando havas sian propran, tre difinitan, tre realan celon en la Dia Civito.

Patruja amo tamen ne pravigas elmontron de nidifinita sentemeco. Unuiĝo kun la Katolika Eklezio ne estas nur malklara idealo, ĝi estas tre reala, konkreta afero.

1. Interakordiĝo estas nur ebla, se ambaŭflanke ekzistas bone difinita bazo de kredo, kaj sufiĉe da aŭtoritato, por proklami kaj imponi tiun minimumon al ĉiuj anoj.

2. Interakordiĝo estas nur ebla, se tio, kio ŝajnas al unu plena kaj sufiĉa dogmaro estas ankaŭ por la alia plena kaj sufiĉa.

3. Fine, interakordiĝo estas nur ebla, se ĉiu flanko plene kunsentas kun la alia pri ĉiuj esencaj punktoj.

Ne plej grava, en tiu demando, estas la simileco de la ritoj. Ĉar ritoj povas esti malsimilaj, kondiĉe ke de ambaŭ flankoj oni ne konsideru similecon de ritoj necesa por unueco.

Facile estas do vidi, kial neebla estis reunuiĝo inter la Katolika Eklezio kaj la Anglikanaro.

Evidente ne decas, ke ni juĝu aŭ kritiku la decidojn de niaj Ekleziaj aŭtoritatuloj. Nia devo estas obeo kaj fido. Tamen persona penso estas rekomendata kaj rekomendinda, kaj mi esperas, ke almenaŭ ni konvertitoj el Anglikanismo plene ŝatos la saĝecon de la Katolika Eklezio kaj de ĝiaj kondukantoj en ilia decido pri Anglikanismo. Ni ja klare vidas, ke kvankam ni kore dezirus reunuiĝon, nenio estus pli malbona ol trorapida, senprepara, supraĵa unuiĝo inter personoj, kiuj reale diferencas en multaj punktoj.

Multe da pacienco, multe da persisto estas necesa por forigi la postesignojn de centjaraj malbonoj.

En tiu momento tamen mi ne deziras longe konsideri tiun malĝojan temon, la diferencoj inter sinnomantaj Kristanoj. Kun ĝojo mi silentus pri tio, se tiu silento ne ŝajnus al mi peko kontraŭ la Vero, peko kontraŭ la singardemo. Plivolonte mi insistus pri tio, kio unuigas nin kun la fratoj, kiuj ne venis kun ni.

Ni preĝas fervore por nia kara patrujo, la glora lando de niaj prapatroj. Ni ploras pri la eraroj, kiuj difektas ĝian

spiritan vivon, sed ni amas ĝian naciecon, ĝian propran mentalon kaj pensadon. Tiujn ecojn ni deziras konservi, ne por la profito de herezo, sed por riĉigi, por ornami nian alian amon, nian pli grandan, eternan hejmon, kiu estas la Sankta Eklezio, la Spirita Patrino de ni ĉiuj.

Ni preĝas, por ke en nia patrujo, kiel en ĉiu ne katolika lando, ĉio ekscesa, ĉio malproporcia, en la religia vivo estu reordigita; ke ĉio malkompleta estu kompletigita, el la diversaj riĉecoj de la Eklezio.

Ni preĝas, ne ke nia nacia vivo estu iel malpliigita, sed kontraŭe ke ĝi estu edukita. Ni preĝas, ne ke ĝia nacia personeco estu forfandigita, sed pliĝuste ke ĝi partoprenu al la glora unueco de la Katolika Eklezio. Ĉar la gloroj de la Eklezio estas vere ankaŭ niaj. Ne malmultaj estas la eminentaj pastroj, la sanktuloj, la martiroj, kiujn Anglujo donis al la Eklezio: nobla aro, malŝatata de la mondo, sed multvalora antaŭ Dio, brilaj juvelaj de la Ĉiela Jeruzalemo.

Kaj ni, kiuj estas duoble iliaj heredantoj kaj posteuloj, ni Angloj kaj Katolikoj, ni preĝas, esperas, kredas, ke venos la tempo, kiam nia kara patrujo, repacigita kaj reunuigita sub unu paŝtato, denove alportos siajn trezorojn al la Eklezio.

La Sanktuloj kaj martiroj de nia lando propetu por Anglujo kaj por ni, por ke baldaŭ eklumu tiu granda tago!

S-ro E. MILSOM.

LA MONAĤOJ DE CALDEY.¹⁾

II.

LA KONVERTIĜO.

Inter Anglaj Kristanoj ekzistas du ĉefaj teorioj pri la signifo kaj pozicio de la „Eklezio de Anglujo”. Ĉiuj katolikoj konsentas, ke ĝi estas nur ŝtateklezio, protestanta

¹⁾ Vidu I antaŭ la Konvertiĝo en E. K. N-ro 97, Junio 1913.

kreitaĵo de la Reĝino Elizabeto, konstruita sur la ruinoj de la antikva katolika Eklezio. Estas vere, ke oni gardis la trabaĵon kaj organizaĵon de la antaŭa Eklezio, tiel ke oni povas diri, ke laŭleĝe la nova institucio estas la sama kiel la malnova, sed fakte kaj en la dia vido ili estas ne nur distingeblaj, sed tute malsimilaj. Ĉar ekzemple, la katolika Eklezio estas unu pri la Fido; sed kiu povas kredi, ke la protestanta eklezio, kiu neis la doktrinon pri transsubstancio, — kiu detruis la sanktajn altarojn, — kiu frakasis la statuojn de la sanktuloj, estas la sama institucio kiel la Sankta Katolika Eklezio, kiu adoras sian Sinjoron en la Ofero de la Meso? Ankaŭ la Eklezio estas unu rilate al la sacerdoteco kaj sakramentoj; sed tiu protestanta eklezio, maluzante la tradiciajn librojn kaj kutimojn de la Eklezio, kreis novan pastrecon al si, difektante la sakramentojn kaj detruante la katolikan sacerdotecon. Kaj denove la Eklezio estas unu laŭ regado, posedante unu ĉefpastron sub Kristo kaj unu sacerdotaron sub la ĉefpastro, Kiu estas la Vikario de Kristo. Sed la protestanta ŝtateklezio estas sendependa de la Papo, Kies aŭtoritaton ĝi klare neas, kaj ĝi rifuzas submetiĝi al la aŭtoritato kaj juĝo de la Kristanaro. Ĝi estas malobeema kaj nepentema; certe ĝi ne estas la sama afero kiel tiu Eklezio kontraŭ kiu ĝi protestas kaj ribelas.

Tio estas la vidpunkto de la Katolikoj; kaj la ordinaraĵoj protestantoj havas preskaŭ la saman opinion. Kompreneble, laŭ ili, la Reformacio estis ribelo, pravigita per la nefidelo de la apostola Eklezio. Tial ke la Kristanaro iom post iom difektiĝis kaj forlasis la veran evangelion, fariĝis devige ke la protestantoj faru kvazaŭ tute novan komencon.

Sed en la „High Church” aŭ katolikema Partio de la „Eklezio de Anglujo” ekzistas alia teorio pri la okazoj de la Reformacio. Laŭ ili, la protestantismo estas vera herezio, kiu atakis la anojn de la Katolika Eklezio en la dekseca centjaro, same kiel la Arianismo en la kvara centjaro, aŭ la Modernismo en la nuna tempo. En la Kontinento la rezulto de la protestantisma epidemio estis: la preskaŭ entuta forigo de multaj regionoj el la Eklezio. En Anglujo

la afero okazis alimaniere. La eklezio kliniĝis antaŭ la ventego kaj ne rompis sin. Oni diras, ke en la kvara kaj kvina centjaroj multaj Ekleziaj distriktoj ŝajnis esti hezitantaj pri la Fido. Ifoje la Episkopo estis ortodoksa, ifoje herezia, ifoje duba. Simile en Anglujo, post la Reformacio, la ortodoksaj episkopoj estis tre malmultaj kaj la pozicio ambigua. La dogmaro estis kovrita per neveraj tradicioj. Sed restis radiko, kiu estis katolika laŭ sia povo kaj oportuno. Kaj kiam fine la tajdo sin returnis, la areto da fideluloj komencis pretigi sin por la tago de la reveno de l' Anglikana Eklezio al la katolika obeeco. Laŭ sia opinio ili estas militantoj gardantaj antaŭpostenon en la lando de la malamikaro, ĝis la armeo helpanta alvenos por savi ilin.

Kompreneble la plej malforta punkto en la tuta teorio estas la fakto, ke la Papa reĝo kaj imperiestro jam ordonis absolute al ili reveni tuj al la ĉefa militistaro, kaj ili persistis malobei.

Supozeble tio estis la ordinara vidpunkto de la monaĥoj de Caldey, kiam ili pripensis la aferon dum la jaroj 1906—1912. Laŭ sia opinio, ili estis veraj katolikoj, sed ne normalaj katolikoj en stato de bedaŭrinda apartiĝo de la sankta Seĝo. Se estus certe, ke la nacia eklezio neniam revenos al la komunio de la Sankta Seĝo, ilia devo estus klara. Sed male, se la alproksimiĝo al Romo daŭras de jaro al jaro, kaj se ili mem povas forte helpi kaj rapidigi ĝin per sia nura ekzisto kaj pligrandiĝanta influo, ĉu ne estus devo resti kaj fini la laboron, kiun la bona Dio espereble asignis al ili?

La erareco de tiu argumento jam estis elmontrita en la antaŭa artikolo; nun sufiĉas diri, ke da devo de obeo malpermesas, ke oni tiel senkulpigu sin pro ribelo kontraŭ la regado starigita de Dio. „*Melior est enim obedientia quam victimae!*”

En la pli frua parto de sia religia vivo, Aelred zorge ricevis la aŭtoritaton de sia episkopo por ĉio kion li faris; ĝis la tago, kiam li forlasis Painsthorpe, sed post tiam ŝajnas, ke li ne sukcesis tion fari. En la opinio de Abato

Aelred¹⁾ la insulo Caldey estis ekster- diocesa kaj ekster-paroĥa, kiel ĝi sendube estis per Papa privilegio antaŭ la protestanta Reformacio. En tiu tempo la Abatoj de Caldey ricevis sian aŭtoritaton de la Papo mem sen ia intermezulo. Sed en la nuna stato ŝajnis al la nova Abato, ke li devos sin turni al la Ĉefepiskopo de la Provinco de Kantuario.

Mi ne povas klarigi kontentige, kial li ne faris tion antaŭ la jaro 1911. En lia unua letero al la Ĉefepiskopo DAVIDSON, datumita la 13an de Decembro 1911, li senkulpigis sin dirante, ke li vere devis peti permeson fari la pastran laboron, kiam li unue venis al Caldey, sed li ne aldonas ke oni forte konsilis al li atendi ĝis kiam estos evidente, ke la laboro ĉesis esti nur eksperimento. Tiu klarigo ne ŝajnas al mi esti tre kontentiga.

Laŭ mia opinio la Abato sciis instinkte, ke li ne trovos amikon ĉe Kantuario; eble li eĉ havis antaŭsenton de la venonta krizo. Kiel ofte okazas en tia afero li esperis, ke la nura pasado de tempe helpos lin. Ju pli longe li prokrastas la malbonan tagon, despli malfacile estos al ia reganto renversi sian laboron. Kaj sendube, multaj amikoj konsilis al li atendi kaj esti dankplena. Mi ne diras, ke la Abato aplombe juĝis la situacion kaj decidis atendi la regadon de nova Ĉefepiskopo. Li ne estas tia homo. Sed mi kredas, ke estis ĉiutage pli facile prokrasti ĝis morgaŭ tian danĝerplenan devon. Tamen memorante ke la Abato estis en sia opinio vera sacerdoto, — ke li diris kion li kredis esti la meson ĉiutage, — ke li verŝajne ricevis konfesojn kaj absolvis

¹⁾ *Noto de la Religia Directoro*: Tie-ĉi la vorto Abato estas uzata en propra signifo.

La „Fundamento de Esperanto” eraras, dirante, ke „abato” estas katolika sacerdoto. La kaŭzon de la eraro mi vidas en la franca alparolado de pastroj per la vorto Abbé. La vorto por signifi per Episkopo sanktigitan plenrangan serviston de la Katolika Religio estu *Sacerdoto*; *Pastro*: la vorto *Pastro* estu uzata pli por signifi la Sacerdoton, kiu havas rajton por ekzerci siajn devojn ĉe limigita parto de la katolikaro, kiel paroĥestro aŭ sub-paroĥestro. *Abato* estu la estro de kelkaj difinitaj monaĥejoj de Benediktanoj kiel *abatino* la estrino de difinitaj monaĥinejoj, ekz. de Brigittininoj.

pekintojn, mi ne scias senkulpigi lin, pro tio ke li ne ricevis la rajton pastrumi de la regantoj de sia eklezio.

Tamen estas certe pro kia ajn kialo, ke Abato AELRED ne skribis al la Ĉefepiskopo, ĝis kiam fariĝis necese tion fari. Kaj ni devas memori, ke, kvankam kelkaj homoj kulpigis lin pro tia longa prokrastado, aliaj egale plendis, ke li ne prokrastis plu!

Ĉiaokaze ni povas esti certaj, ke dum tiuj ses jaroj ek-estis iuj el tiuj kutimoj, kiuj rapidigis la finan krizon. Sub la amika sed atentema okulo de la Ĉefepiskopo MAC LAGAN ne estas verŝajne, ke la Abato komencis uzi la Katolikan Meslibron aŭ doni la Benon de la Sankta Sakramento. Sed ĉe Caldey, kie ili estas malproksimaj de ne-amikaj kritikistoj kaj liberaj de la supervido de ĵaluza aŭtoritato, la kondiĉoj faciligis la uzadon de „Romaj kutimoj” sen riproĉo aŭ malhelpo. En tiu afero mi ne tre mallaŭdas la Abaton. La Ĉefepiskopo TEMPLE en la jaro 1902 donis al ili permeson uzi la Breviaron. Sed ĉiu scias ke la Brevario kaj la Meslibro estas vere du partoj de unu libro. Oni ja povus uzi la Breviaron sen la Meslibro; sed oni ne povas uzi oportune la Breviaron kune kun la Anglikana „Book of Common Prayer”. La Preĝo, la Epistolo kaj la Evangelio, kiuj estas la ĉefaj partoj de la „Proprio” de la Meso estas ankaŭ la ĉefaj ĉeneroj inter la Meso kaj la Dia Oficio. Sed estas precipe en tiu rilato, ke la Angla „Preĝlibro” sekvas alian aranĝon.

Ekz. en la nuna jaro, la 7a de Septembro estas la 17a Dimanĉo post Pentekosto. La Preĝo estas „Da, quaesumus Domine, populo tuo diabolica vitare contagia: et te solum Deum pura mente sectari”.

La Epistolo estas „Obsecro vos ego vinctus in Domino...” (Eph. 4.)

La Evangelio estas „Accesserunt ad Jesum...” (Matt. 22.d.)

Nu, laŭ la Anglikana Preĝlibro la 7a de Sept. estas la 16a Dimanĉo post Triunuo.

La Preĝo estas „Ecclesiam tuam, Domine,...” kiun ni uzas je la 15a Dimanĉo post Pentekosto.

La Epistolo estas „Obsecro vos ne deficiatis. . .” (Eph. 3.c.) kiun ni uzas la 16an Dimanĉon post Pentekosto.

La Evangelio estas „Ibat Jesus in civitatem. . .” (Luc. 7.b.) kiun ni legas la 15an Dimanĉon post Pentekosto.

Estas kompreneble, la Anglikana aranĝo estas samtempe tro simila kaj tro nesimila al nia por la feliĉeco de tiuj, kiuj penas uzi ambaŭ librojn, kaj ni ne bezonas miri ke la monaĥoj de Caldey tre deziris uzi la Meslibron same kiel la Breviaron. Antaŭ ol la Abato fariĝis pastro, tio ne estis eble. Sed tuj kiam ili venis al Caldey, se ne antaŭ tio, la Meslibro anstataŭigis la Anglikanan Preĝlibron. Estas juste aldoni, ke kiam ajn pastro venis kiel gasto al la monaĥejo, la Abato insistis, ke li uzu la Anglikanan Libron.

Oni sentas forte, ke dum tiuj ses jaroj la monaĥoj de Caldey ekvidis la rokon kontraŭ kiu tiel multaj anglikanaj *ŝipanaroj* kuris kaj pereis. La protestantaj episkopoj ne povas permesi tion, kion la katolikemuloj kredas esti necese al sia religia bonstato. Tio estas vera kaj sufiĉa kaŭzo de la reokazantaj krizoj en la Nacia Eklezio. Sed al tio ni devas aldoni, ke la katolikemaj anglikanoj neniam komprenas, kial la episkopoj egale ne komprenas, kial la katolikemuloj ne povas pace submetiĝi al iliaj postuloj. Do ambaŭ-flanke ekzistas sento de justa plendkaŭzo.

Antaŭ ol ni resumas la historion, oni povas demandi, ĉu ekzistis alia kaŭzo krom tiuj, kiujn ni jam priparolis pro kiuj li subite rompis la silenton de ses jaroj. Kredeble la respondo devas esti jesa. Ni trovos, ke dum la sekvanta Kvadraĝesimo tre granda krizo okazis en la monaĥaro. La Abato skribante al la Ĉefepiskopo DAVIDSON post Pasko, parolas pri tio libere kvankam sen emfazo. Tiam la danĝero jam pasis; tamen ĝi ja estis tre grava. Ĉar la monaĥaro diskutis dum kelkaj semajnoj sian devon al la Posteulo de S. Petro.

Estas malfacile kredi, ke tiu ventego ekokazis subite en la printempo sen ia antaŭ-minaco en la antaŭa vintro. Ni trovas nenion en la korespondo dum tiu periodo, kio minacas maltrankviligi la Abaton aŭ liajn kunulojn. Kaj estas verŝajne, ke se iu en tiu tempo eksentus dubojn je la unua

fojo, li kompreneble atendus la rezulton de la novaj interrilatoj kun la Ĉefepiskopo. Kontraŭe supozante, ke la komenco de la afero estis maltrankviliĝo inter la monaĥoj, ĉio fariĝas klara. Iu monaĥo sentas dubojn pri la Roma demando aŭ pri la pozicio ĉe Caldey. Oni demandas per kiu aŭtoritato la Abato faras meson, absolvas, k.t.p. La Abato mem neniam povas forgesi, ke li estas la sola Benedikta Abato, kiu ne estas samekleziano kun la Papo. La Sankta Seĝo tute ne konas lin. Kion pri Kantuario? Almenaŭ li devas ricevi formalan rekonon de la anglikana Ĉefepiskopo! Tion li decidis sen prokrasto.

Tiu ĉi klarigo de la interna stato de Caldey estas pravigita de la Abato mem en letero, kiun li skribis al Episkopo GRAFTON la 24an de Julio. Li diras, ke la Roma demando „de tempo al tempo postulis nian atenton”.

La rekono, kiun la Abato nun deziris, ne estis facile atingebla. Oni povas diri, ke li atencis fermi la pordon post la forkuro de l' ĉevalo. La diskutado daŭris pri la pretendoj de la Papo; kaj li ne povis ĉesigi ĝin. Oni diras, ke li mem estis tre hezitema. Estis tute neoportuna, ke tia diskutado daŭras dum la korespondado kun la Ĉefepiskopo, sed oni ne povis malhelpi. La sola rimedo kuraci la malfeliĉon estis plena kaj libera esplorado de la problemo. Oni invitis la helpon de kelkaj kleruloj, kiuj venis al Caldey kaj penis recertigi la balanciĝantajn monaĥojn. Fine antaŭ Pasko ili unuanime konsentis, ke ilia devo estas resti en la nacia eklezio kaj preĝi kaj labori por la reunuiĝo kun la Sankta Seĝo. La Abato sendis la sekvantan rakonton de la okazintaĵoj al Episkopo GRAFTON de Fond du Lac en letero datumita la 24an de Julio 1912.

„Kiel vi eble aŭdis, ni antaŭnelonge trapasis krizan tempon rilate al la Roma demando. Tiu afero de tempo al tempo postulis nian atenton je diversaj manieroj, kaj tial ni sentis en la lasta Kvadraĝesimo, ke ni devas serioze konsideri nian pozicion kiel monaĥaron, kaj ekscii klare kia ĝi estas. Ni pasigis multe da tempo en zorga prikonsiliĝo, kaj antaŭ Pasko ni povis atingi plej feliĉan kaj unuaniman decidon pri nia pozicio en la Eklezio de Anglujo. Estis klare mon-

trite al ni, ke Dio metis nin kie ni estas, kaj ke estus tute malprave, se ni ĉesus teni nian nunan pozicion por transdoni nian obeon al la Roma Eklezio. Unu sole malkonsentis tiun decidon, kaj li tuj forlasis nin por aliĝi al la Roma Eklezio. Sed antaŭ ol li tion faris, li ŝanĝis sian intencon; sekve ni pasis tra unu al la plej malfacilaj religiaj okazintaĵoj sen ia perdo, sed kun la granda gajno de pli klara kompreno de nia pozicio, kaj kun unuanimeco, kiu estus neebla se ni ne estus gviditaj decidi la demandon tiamaniere.”

Tiu letero certigas al ni, ke la Roma demando ne prezentis sin al la monaĥoj je la unua fojo en la printempo de 1912. Tio konsentas kun la antaŭdonita klarigo de la krizo.

Kiel ni jam diris, la Abato komencis korespondon kun la Ĉefepiskopo de Kantuario (D-ro DAVIDSON) en Decembro 1911. Li ricevis baldaŭan respondon de la sekretario de la ĉefepiskopo, postulante ke li sendu ĉiujn dokumentojn koncerne la aferon. En la sekvanta Februaro, la ĉefepiskopo skribis al Abato Aelred amike sed ne tre kore, kaj proponis al li intervjuon, kiu fakte okazis la 6-an de Marto.

En la komenco la Abato klarigis la tujajn bezonojn de la Monaĥaro. Unue li deziris la formalan permeson de la ĉefepiskopo fari la pastran laboron en la Insulo Caldey. Due li petis, ke iuj el la monaĥoj pastrigos. Je tiu tempo estis nur tri pastroj en la monaĥaro krom li.

Poste la Abato donis sinceran klarigon pri la Fido kaj vivmaniero de la monaĥoj, menciante la uzadon de la Meslibro kaj Breviario en la kapeloj de la Monaĥaro, kaj aldonante, ke ili daŭras uzi la Anglikanan Preĝlibron en la vilaĝa preĝejo de Caldey. La ĉefepiskopo aŭskultis atente kaj faris kelkajn demandojn pri tiuj aferoj sen ia esprimo de sia opinio. Tamen li montris, laŭ la Abato, ke li deziras „fari ĉion kion li povas por ĉiuj kiuj estas farantaj bonan laboron interne de la larĝaj kaj liberaj limoj de la Eklezio de Anglujo”. Fine li promesis baldaŭan respondon.

La 20-an de Majo la Abato ricevis la atenditan resp-

ondon. La letero estis amika, sed tre singardema. Li konsilis, ke la monaĥaro elektu episkopon kiel „Vizitanton”, kaj proponis la Episkopon de Oxford, kiu interesas sin en tiaj aferoj. Kaj li aldonis, ke li ne povas konsenti al la diversaj demandoj de la Abato, gis kiam oni decidis tiun antaŭaferon.

La monaĥoj akceptis la konsilon de D-ro Davidson, kiu sufiĉe konsentis kun iliaj deziroj, sed la Abato ja ne skribis al la Episkopo de Oxford antaŭ la 3-a de Oktobro, kiam li demandis ĉu oni povas elekti lin kiel „Vizitanton” en la ĉiujara grandkunveno je Pentekosto. Li esprimis la koran deziron de siaj fratoj, ke la Episkopo mem venu al Caldey, kaj vidu ĉion kion ili faras, kaj povu decidi pli kontentige pri la tuta afero.

La Episkopo de Oxford estas persono, kiu ricevas la koran respekton de la pli granda parto de la „High Church” — Partio de la Nacia Eklezio. Li estas klerulo kaj piulo, kaj donis tre grandajn monarojn al sia Eklezio. Lia verko pri „The Church and the Ministry” (La Eklezio kaj la Pastraro) estas tre utila defendo de la episkopa Regado en la primitiva Kristanaro. Liaj konferencoj pri la Enkarniĝo de la Filo de Dio ne estas tiel kontentigaj al katolikoj aŭ al multaj el liaj samreligianoj. Kaj lia verketo kontraŭ „Roman Catholic Claims” estas tiel triviala, ke oni demandas sin ĉu li vere sentis ian intereson pri la temo. Kvankam li estas kontraŭromulo kaj eble modernistema, oni devas aldoni, ke li forte skribis kontraŭ la ultra-modernismo, kiu tiel venenas la mensojn de la angloj en la nuna tempo.

La Episkopo respondis iom malvarme al la invito de la monaĥoj. Li diris, ke li zorge konsideros la inviton, kaj dume ekzistas multe da antaŭaferoj. Li volus viziti ilin en la insulo, sed nuntempe li ne povas. Li deziras, ke ili venigu al li ĉiujn preĝlibrojn, regulojn, k. c. Li donas al ili sian benon.

Estas neeble tralegi tiun leteron kun la scio, ke la skribinto jam konsiliĝis kun la ĉefepiskopo de Kantuario, ne demante sin ĉu la anglaj aŭtoritatuloj jam decidis elpeli la Caldey-anojn el la anglikana ŝafejo. Certe neniu

povas studi la aferon de komenco al fino, ne vidante la gvidantan manon de la bona Dio, kondukantan ilin malrapide sed neeviteble al la fina celo.

Sed sub la regado de la Dia antaŭzorgo oni ofte povas ekvidi la homan intencon bonan aŭ malbonvolantan. Oni libere kaj malice asertas ke la monaĥoj de Caldey dum la tuta jaro fiksis la okulojn je la Eterna Urbo, kaj nur penis meti la mallaŭdon sur la episkopojn. Tio ne estas kredebla; iliaj agoj same kiel iliaj vortoj antaŭ kaj post la eliro kontraŭ-diras tiun akuzadon. Sed ne estas tiel facile trovi kontentigan respondon al la demando, ĉu la longaj diplomatiaĵoj de la anglikanaj aŭtoritatuloj ne estis granda malŝparado de tempo, intence kondukantaj al la fina krizo.

Alterne, oni devas kredi, ke la episkopoj estis frapitaj de la spirito de blinda malsaĝeco, ĉiam farante rigoraĵojn en la plej nesimpatia maniero, ĝis la frapo de la subita krizo trovis ilin surprizitaj kaj sen rimedoj.

La Abato respondis je la 21-a de Oktobro, esprimante bedaŭron, ke la Episkopo ne povas veni baldaŭ al la insulo kaj petante, ke li venigu du aŭ tri pastrojn, kiujn li konfidas, por ke ili donu al li ekzaktan informon pri la religia vivado en Caldey. Evidente li timas, ke la Episkopo faros regulojn sen simpatio aŭ vera kompreniĝo de la spiritaj bezonoj de la religiuloj, kiel povas okazi tro ofte en eklezio, kie la ĉefpastroj estas ŝtat-oficistoj pli ol pastroj.

En la monato Novembro la Abato ricevis D-ron DARWELL STONE kaj S-ron W. B. TREVELYAN, kiuj zorge ekzamenis la vivmanieron de la monaĥoj kaj preparis plenan raporton por la Episkopo. Ili konsiliĝis amike kun la Abato pri la enhavoj de la raporto kaj sendis al li kopion de sia letero al la Episkopo de Oxford. Je la 8-a de Februaro la Abato ricevis longan leteron de la Episkopo mem. Ĝi enhavis kvar ĉefajn punktojn, kiujn mi mallonge resumos.

1. La Episkopo postulis, ke la tuta posedaĵo, insulo, konstruaĵoj, k. t. p., fariĝu la posedaĵo de la Eklezio de Anglujo, tiel ke ĝi ne povos aparteni al iu homo aŭ hom-

aro, kiu ne estas Anglikana. Ni notu, ke en tiu afero la unua penso de la Anglikanoj estis ĉiam pri la „posedaĵo”.

2. La Episkopo postulis, ke la Monaĥoj ĉiam uzu la Komunion Diservon (aŭ Liturgion) de la Angla Preĝlibro, kaj tute ĉesu uzi la Meslibron. La Pastroj devas ankaŭ diri la Maten- kaj Vesper-Diservojn laŭ la Anglikana uzado. Verŝajne li permesas samtempan uzadon de la Breviario.

3. La Episkopo postulis, ke la doktrino de la Senmakula Konceptio de la Beata Virgulino, kaj (li opinias) la doktrino de ŝia Korpa Asumcio estu forigitaj el la Breviario kaj Meslibro! (Ŝajnas ke li jam forgesis, ke li tute malpermesis la Meslibron mem.) Tiuj doktrinoj en lia opinio ne povas esti rajtigitaj „krom sur absolute Papa bazo de aŭtoritato.”

4. Li postulas la ĉesigon de la Montrado kaj Beno de la Sankta Sakramento; kaj ankaŭ „verŝajne” de la Montrado de Relikvoj.

Fine, li ne povas promesi, ke tiu listo estas kompleta.

Eĉ de simple Anglikana vidpunkto tiu letero estas miriginda. La verkinto estas la estro kaj probatalanto de la tiel-nomataj „anglo-katolikoj”. Tiu estas la viro, kiu en en siaj propraj vortoj „volas trovi sin, en la eklezio de Anglujo, nun en la dudeka centjaro, unuanima trans la temparoj kun la antikva kristana Eklezio”. Kaj tiu estas la viro, kiu klarigas siajn finajn kondiĉojn *sine qua non* al la piuloj de Caldey; kaj li estas tiel senzorga, ke li „pensus” ke li ne povas permesi la doktrinon de la Korpa Asumcio kaj li „verŝajne” ne povas toleri la honoregon al la relikvoj. Kaj fine li diras, ke tiuj aferoj ŝajnas al li esti klaraj kaj „resti ekster ĉiu ebleco de marĉando aŭ cedado”. Post tio la fino estis videbla.

Kiel mi jam diris, en la antaŭa Kvadraĝesimo la monaĥoj serioze priparoladis pri sia pozicio en la Anglikana Eklezio, kaj pri sia devo al la Sankta Patro. Post plena diskutado ili decidis, ke ili ne trovis sufiĉe klaran montron pravigi forlason de sia estanta pozicio. Ŝajnis al ili, ke dum ili povas plenumi sian celon en la nacia eklezio, ili devas kredi, ke ilia laboro sin trovas tie, ĝis kiam ili ri-

cevos klaran alvokon de Dio iri alien. Kiel unu amiko diris al ili, „La monaĥaro estas vera produkto de la Eklezio de Anglujo.” Sed nun la dirita eklezio rapidis nei siajn infanojn; ĝi anoncis, ke iliaj laboroj ne estas ĝiaj. Ili povas resti nur kondiĉe, ke ili staras dum la tuta tago senlaboraj. Aŭ ili povas ludi je la monaĥa vivo sen la fido kaj la preĝregularo, kiu ebligas tian malfacilan taskon. Tio, kion la Protestanta Eklezio donas al la laikoj tiel laŭ ĝi, devas kontentigi la monaĥojn: fragmentoj de la Katolika Fido, derompaĵoj de la sakramenta sistemo. Ĝi ne scias, nek zorgas, nek komprenas la bezonojn kaj danĝerojn de la interna vivo. Sen simpatio, sen sento, sen amo ĝi eraregas, kiel povus eraregi politikisto en episkopa seĝo.

La Abato estis viro singardema; li deziris esti tute certa ekster ĉiu ebleco de dubo, ke la episkopo volas diri kion li diris. Li intencis legi la leteron al la monaĥaro je la 16-a de Februaro; li sentis, ke estos kiel mortjuĝo. Ĝi enhavis nenion da aprobo aŭ kuraĝigo aŭ simpatio, nur severan postulon, ke ili tuj cedu posedaĵojn, librojn, preĝojn, kredojn, kaj poste pretigu cedi plu! La Abato skribis tuj al la episkopo esperante ricevi de li ion, kio povos pli moligi la perforton de la frapego. Li sciigas tion, kion la episkopo intencas malpermesi; li volus ekscii, kion li estas preta permesi. Li petegas, ke la episkopo certigu lin pri la doktrino koncerne la Sanktegan Eŭkaristion, kaj pri iliaj piaj kutimoj, kiujn li nomas kaj ankaŭ pri la alvoko de la Dipatrino kaj de la Sanktuloj.

Oni mallaŭdis la Abaton pri tiu letero, kvazaŭ li intencis fari la kutiman kompromison. Pli verŝajne li intencis doni al la episkopo lastan oportunon por klarigi liajn intencojn kaj samtempe admoni lin pri la rezulto de tiaj postuloj. Li ne povis diri klare al la episkopo, ke li faras grandan eraron, sed la letero enhavis vualitan averton. La episkopo aŭ ne komprenis aŭ ne zorgis, eble li eĉ decidis, ke krizo estis dezirinda. Li respondis mallonge, ke li ne intencas fari malfacilojn pri la kredo je la Vera Ĉeesto de nia Dia Sinjoro en la Sanktega Sakramento, aŭ pri la Adorado de

Li tie; kaj aldonis ke li preferas agi laŭ sia antaŭklarigita metodo.

Ŝajnas ke ekzistis iaj punktoj pri kiuj li sentis sin certa en la komenco; kaj tiujn li preferis decidi en la unua loko. Malfeliĉe, tiuj punktoj estis ĉiuj negativaj.

La monaĥaro priparolis la postulojn de la Episkopo la 16-an de Februaro, kun la preĝo de la Eklezio sur siaj lipoj, „*Libera nos, Deus Israel, ex omnibus angustiis nostris*”. Ili decidis unuanime, ke ili ne povas akcepti kondiĉojn, kiuj faros ilian vivon sub la Benedikta regulo tute neebila. Dudek-sep el ili (t. e. ĉiuj esceptinte kvar) subsignis leteron, dirante: „La antaŭaferoj, kiuj ŝajnas al via Episkopa Moŝto tiel klaraj, ke ili kuŝas tute ekstere de ĉiu ebleco de marĉando aŭ cedado, tuŝas aferojn, kiuj estas esencaj al nia koncepto de la Katolika Fido; kaj viaj postuloj estas tiel decidigaj, ke ni estas devigitaj agi laŭ tio, kion ni kredas esti la Dia volo por ni”.

La Episkopo skribis mallongan respondon, petante, ke ili reprenu tiun leteron kaj denove pripensu la tutan aferon.

La Abato denove skribis tre longan leteron je la 22-a de Februaro de la nuna jaro. Li montris, ke la tuta demando rilatis al „aŭtoritato”. Sen la klara aŭtoritato de la Eklezio ili ne povas daŭrigi sian laboron. La Episkopo jam klare montris al ili, ke en la Anglikana Eklezio tiu laboro ne povas esti farita. Iliaj espero kaj celoj evidente malsukcesis rilate al la Eklezio de Anglujo. Ili ne povas cedi, kion ili kore kredas; ili ne povas daŭri teni en la nacia eklezio tion, kion la Aŭtoritato ordonas ke ili cedu. Ili do devas akcepti (en la frazo de la episkopo mem) „la absolute Papan bazon de aŭtoritato”.

Li aldonis, ke la monaĥinoj de S. Bride's, antaŭe de Malling, al kiuj li estas „Vizitanto”, faris la saman decidon. „Ni submetiĝos, ĉar ni nun kredas, ke ne povas esti ia organizita kaj fortika formo de katolika vivo ekstere de la kuniĝo kun tiu Seĝo, for de kiu niaj anglaj prapatroj estis perforte apartigitaj”.

La lastajn vortojn de la Abato pri tiu ĉi afero ni trovas en la letero de la Abato, verkita en la Abatejo de Mared-

sous je la 26-a de Aprilo 1913, kaj eldonita en *Pax*, kiu estas la kvaronjara gazeto de la monaĥaro. Multaj maldolĉaj vortoj, multaj riproĉaj kritikoj venas al la oreloj kaj okuloj de tiuj, kiuj faras ŝanĝon de sia religia obeado. Tio ofte ŝajnas kruela al ili kaj al iliaj amikoj, precipe kiam la novaj kunuloj, aŭ iuj el ili, estas preskaŭ tiel kritikemaj kiel la forlasintaj. Sed la letero de la Abato estas modelo de pacienco. Kiel simple li diras: „Tio, kion mi faris, ne estis facila afero, sed nekredeble malfacila”. Jen li parolas el koro.

Ankoraŭ unu citon de lia letero. „Nun mi ne parolas por aliaj, sed por mi. Estas persona spirita sperto, kaj mi nur povas diri, ke en Februaro 18-a la tuta pozicio fariĝis klara al mi, kaj mi estis tute konvinkita, ke la Dia aŭtoritato kaj unueco de la Katolika Eklezio estas trovebla nenie alie ol en la unuiĝo kun la Sankta Seĝo”.

Je la 22-a de Februaro, la Festo de la Seĝo de S. Petro en Antioĥio, la Abato sendis leteron al Dom Bede Camm, kiu alvenis al Caldey en la 25-a. La sekvantan Vendredon, kiu estis la Festo de la Kvin Vundoj, Dom Bede oferis la unuan Meson en Caldey, kaj en la 3-a de Marto alvenis lia Moŝto Dom Kolumba Marmion, Abato de Maredsous. La ricevado de la Monaĥoj en la Katolikan Eklezion okazis feliĉe en la Festo de S. Aelred, la 5-an de Marto, kiam ĉeestis la Episkopo de Menevia, la Abato de Downside, kaj Abato Avignon de Caermaria. La Episkopo mem ricevis la konvertantojn kaj faris la Meson kaj donis al ili la unuan komuniĝon.

Kiel mirinde la vortoj de l' Meso de la Festo esprimis la sindonadon kaj ĝojon de tiuj, kiuj forlasis ĉion pro Kristo kaj Eklezio! Vere kaj juste ili povis ekkrii kun S. Petro, „*Ecce nos reliquimus omnia et secuti sumus te*”. Kaj kio pli kuraĝiga ol la promeso, „*Omnis qui reliquerit . . . propter nomen meum, centuplum accipiet, et vitam aeternam possidebit*”.

Je tiu tempo la Monaĥaro konsistis el tridek-tri fratoj, t. e. naŭ fratoj en solenaj votoj, dektri en simplaj votoj, kvin Novuloj, kaj ses Oblatoj. Dudek-du fratoj estis rice-

vitaj en la Festo de S. Aelred, kaj tri pli poste. Unu frato en solenaj votoj, du en simplaj votoj, unu Novulo, kaj kvar Oblatoj ankoraŭ restis en la skismo, kiam la Abato skribis je la fino de Aprilo. Ni preĝu senĉese al Dio por ili.

El la monaĥinoj tridek-sep katolikiĝis, enkalkulate tri sekularaj, kiuj vivis en la domo. Tio estas preskaŭ ĉiuj.

Kiel bonkore la Eklezio ricevas siajn revenantajn infanojn!

Kiel gaje kaj kuraĝe ŝi renkontas ilin kaj akceptas iliajn donacojn, kaj alfaras ilin al siaj propraj celoj! Sen plendo, sen konfuzo ŝi vidas klare la esencajn karakterizajn faktojn de la situacio, kaj agas sentime. La Abato de Maredsous ricevis la du societojn de monaĥoj kaj monaĥinoj kiel Oblatojn de S. Benedikto, kaj lasis Dom John Chapman kaj Dom Bede Camm en Caldey por regi la monaĥaron dum la forestado de Abato Aelred, kiu nun estas Novulo sub Dom Marmion ĉe Maredsous. Oni esperas, ke post kelkaj monatoj la heroo de nia historieto revenos, vera monaĥo kaj vera Abato, por plenumi la laboron, kiu estas la deziro de lia animo. „*Desiderium animae ejus tribuisti ei, Domine, et voluntate labiorum ejus non fraudasti eum*”.

A. H. NANKIVELL.

Katolikemaj Movadoj en Bulgarujo.

Verkis Johano KOZMA,
greko-katolika kateĥisto en Szerencs, Hungarujo.

La 21-an de Aŭgusto 1912, la katolika Tria en Budapeŝt voĉdonis belegan deziresprimon.¹⁾ La kongreso, aŭdinte mian senfortan paroladon pri la reunuigo de l' orienta eklezio, aŭdinte ankaŭ la sukcesplenan paroladon de la katolikema anglikano, S-ro Francisko JAMES LANGFORD esprimis sian varman deziron: ke ĉiuj katolikoj en la mondo, kaj ĉefe la katolikaj Esperantistoj laboru ageme kaj preĝu plej konstante kaj fervore por antaŭenpuŝi la reunuiĝon de l' skizmiĝintaj eklezioj al la Petro-Apostola Seĝo, por

ke, kiel eble plej baldaŭ, la tuta Kristanaro estu en unu ŝafaro sub unu paŝtato.

Ĉu la katolikoj, kaj precipe la Esperantistoj preĝadis pli fervore? Nur Dio scias! Mi ne havas la rajton demandadi pri la spiritaĵoj, graciaj motivoj, mi devas nur sciigi al la legantaro de E. K. la fakton, kiu ĝojigos ĉiun katolikon en la mondo: *Bulgarujo* — se ni preĝados iom pli fervore kaj iom pli konstante, — *baldaŭ katolik ĝis*.

En mia parolado dum la tria kongreso katolik-esperantista mi prononcis, ke nur politikaj kaŭzoj malhelpas la revenon de l' orienta eklezio al la diestorigita estreco; nune mi povas konstati, ke politikaj kaŭzoj revenigos la bulgarojn en la veran ŝafaron de Kristo.

La bulgara deputataro, kiu dum la pasinta somero vizitis Romon, ricevis la respondon, ke la Apostola Seĝo ne faros paŝojn nek por, nek kontraŭ la reunuiĝmovadoj. La motivoj ja estas politikaj, kaj Romo ne povas aprobi la vidpunktojn, kiuj konsideras la konvertiĝon kiel politikajn rimedojn. Se Bulgarujo tamen revenos al la katolikismo: estu bonveninta! (*Corriere della Sera*). Mem la neoficiala katolikaro, do la katolikaj unuiĝoj, societoj, personoj k.t.p. tamen devas labori ageme, kaj preĝadi fervorege, por ke la reunuiĝo sukcesu, kvankam el politikaj kaŭzoj. Tiu-ĉi agado ne kontraŭdiros al la Roma respondo, ĉar Romo *deziras* la reunuiĝo el religiaj motivoj kaj *permesas* el politikaj motivoj.

Vojoj de Dio estas neellerneblaj. Eble la nuna generacio konvertiĝos el politikaj motivoj, sed la postaj generacioj jam estos fidelaj kaj bonaj katolikoj en koro. Eble la nuna Bulgarujo trovos nur politikan kaj materialan feliĉon per la reunuiĝo, sed la venonta jardeko jam alportos per ĝi eternan spiritan feliĉon por la bulgaroj.

Preĝu kaj laboru!

*
* *

Daŭre de longaj centjaroj la Kristana bulgara gento estis submetita al la turka regado. Multego da suferoj estis

1) Vidu: *Espero Katolika*, 1912, novembro. Paĝoj 334—335 de N-ro 90.

portitaj de tiu kulturema popolo sub la malprogresema turka hegemonio. Ne estas mirinde, ke la bulgaroj ne povis trovi sian kvieton, ĝis ili elbatalis sian sendependecon. La unua jardeko de la XX-a jarcento sukcesigis por la bulgaroj atingi la tutsendepecon. Nur la t. n. makedon-bulgaroj restis sub turka regado. Por liberigi ilin Bulgarujo komencis la 1913-an kontraŭ-turkan militon. La celo ne estis atingita. La makedon-bulgaroj estis liberigitaj de la turka regado, sed plejparte falis sub grekan kaj serban regadojn. Kaj tiu sukceso ne alportis tiom da kultura gajno, ol da malgajno el nacia vidpunkto. Sub turka regado la bulgaroj povis konservi sian nacian kaj rasan karakterojn, sed la greka kaj serba regadoj klopodas perforte fari ilin grekaj kaj serbaj. Tiuj-ĉi estas la politikaj motivoj, kiuj maturiĝi helpis la ekpenson de l' proksimumiĝo al Romo.

La ekleziaj kaŭzoj estas similaj. Inter la katolika kaj skizmiĝinta orienta (t. n. ortodoksa) eklezioj *la dogmaj diferencoj estas nur tre malmultaj* Nur disciplinaj diferencoj ekzistas, kaj la demando de l' estreco, kiuj estas same tre facile interkonsenteblaj.

Dum la turka regado, antaŭ la jaro 1860 la bulgara „ortodoksa”¹⁾ eklezio estis submetita al la grekaj patriarĥoj en *Konstantinopolo*, loĝantaj en la faŭburgo *Phanar* (Fanar). Tiuj patriarĥoj volis esti favorataj ĉe la turka „pordego”, kaj klopodis grekigi la bulgarojn. Grekajn pastrojn, grekajn episkopojn sendis la patriarĥoj en Bulgarujon. Grekan liturgian lingvon ili uzis, kaj krom la subpremado ili ne havis alian celon, nur plenigi siajn monujojn.

Dum la kvina jardeko de la XIX-a jarcento la dormanta bulgara popolo vekigis, kaj ekkomencis la movado: starigi bulgaran nacian eklezion. Rusujo — la protektanto de l' greko-orienta eklezio en la *Balkano* — faris ĉion por malebligi la efektiviĝon de la bulgaraj deziroj. Tiam la bulgaroj ekpensis la solvon: reiri en la katolikan eklezion.

¹⁾ En la sekvontaj partoj la „ortodoksa, ortodoksismo“ k.t.p. esprimoj estos uzataj en la senco, kiel la skizmiĝinta eklezio uzas. Do „ortodoksa eklezio“ = greka au ruza skizmiĝinta eklezio, orienta eklezio ne unuiginta.

La organizado komenciĝis, *jam estis nomita la katolika ĉefepiskopo por Bulgarujo*, kiam la rusaj diplomatistoj sonigis retiriĝon, kaj permesis, ke Bulgarujo estu submetota al sia propra *eksarĥo*, loĝonta en *Konstantinopolo*, kiu sendos samgentanajn pastrojn inter la bulgaran loĝantaron.

Rusujo timis, ke la bulgaroj, sub la kultura influo de la propra, nacia eklezio, estos sufiĉe fortaj fari memstaran politikon en oriento. Bedaŭrinde la bulgaroj ne povis ek-koni la rusajn celadojn, kaj restis en la komuneco de la „ortodoksa” eklezio. Kaj Rusujo faris ĉion, ke la bulgara *eksarĥo* ne estu tute libera je l’ influo de la *Fanar-a patriarĥo*.

La dua *balkana* milito pruvis por la bulgaroj, ke *Phanar* kaj *Rusujo* agadis tiamaniere, ke Bulgarujo preskaŭ devis morti. Tial la bulgaroj klopodas tute liberigi siajn ekleziojn de la *Fanar-a* kaj de la rusa influoj. La bulgara registaro jam ordonis, ke *Jozefo*, la bulgara *eksarĥo* ŝanĝu sian residejon, kaj venu loĝi en *Sofion*. La bulgaroj pli kaj pli deziras la unuiĝon kun la *Roma* Seĝo. Ili esperas, ke la katolika Bulgarujo, sub protektado de Hungarujo kaj Aŭstrio povos pli flori, ol sub la nesincera rusa protektado.

*
**
*

Post kiam la bulgara gazetaro estis liberigita de la cenzuro, kiu premis ĝin dum la militoj, tago post tago aperas artikoloj, kiuj pravas, ke la bulgaroj estas trosatintaj je la boneco de Rusujo, kaj enuis la intrigojn de *Phanar*. La radikala ĉiutaga ĵurnalo *Dnevnik* publikis ĉefartikolon jam en la unuaj tagoj de septembro 1913, pri la neceseco de l’ reunuiĝo sub surskribo: *Religio kaj nacieco*. Ni konatiĝos nur la plej gravajn partojn de la atentinda ĉefartikolo.

„La eklezia unueco kun Romo plifortigos la nacian konscion de la bulgara gento, kaj prezentos povojn de la sama kultura progresiĝo, kion oni vidas ĉe la slavaj gentoj, kiuj jam longe antaŭe disŝiris la ligilojn kun la degenerinta *Fanar-o*. Estas la plejurganta tempo, ke ni forlasu ĉiujn interrilatojn kun la pagana ortodokseco, — tiu granda pekulo de la dua Romo, — kaj ekiru novan vojon. Brakoj de Romo ame nin atendas; ĝiaj pastroj havas amon al

ni. Ni devas forlasi la imageman ortodoksismon! Pastroj, instruistoj, politikistoj, propagandu tiujn-ĉi pensojn! Per ilia efektivigo ni savos nian genton”.

La oficiala organo de la reganta partio, la *Veĉerna Poŝta* (Vespera Poŝto) la 25-an de septembro publikigis ĉefartikolon pri la neceseco de l’ reunuiĝo, kaj konstatis, ke neniu ilo ekzistas pli taŭga ĉesigi la maldolĉan situacion de la makedon-bulgaroj, ol reiri al la Roma Seĝo. Por priparoladi kaj pritrakti la gravan temon, la ĵurnalo malfermis siajn paĝojn.

En samtiu gazeto la saman tagon estis enpresita la artikolo de iu ortodoksa, macedon-bulgara pastro, kiu maldolĉe priplendas la malbenojn de l’ ortodoksismo.

„Ni havas la bohemojn, polojn, slovenojn, karantanojn, kroatojn kaj dalmatojn. Tiuj-ĉi estas ĉu katolikoj, ĉu unuiĝintaj (grekoj); sed ili restis memstaraj gentoj kun memstaraj naciecoj, religiaj kaj kulturaj vivoj... Rusujo estas troege ortodoksa... Sed ĝia ortodokseco estas nur vorto senenhava. Nek minimume ĝi helpas remalsovaĝiĝi la kru-dajn morojn de l’ homoj, nure ĝi taŭgas por kaŝi la hontaĵojn, la mensogojn kaj la malnoblaĵojn sub greka mantelo. *La ortodoksismo alvokis la turkojn kontraŭ la slavo de Balkano*; per ĝi subpremendis kaj piedpuŝegis la grekoj kune kun la turkoj la naivan bulgaran popolon daŭre de 500 jaroj; en la nomo de tiu sama ortodokseco tiuj samaj grekoj nun volas denove ekstermi tiun saman popolon.”

La 26-an de septembro la ĵurnalo *Veĉerna Poŝta* skribas la jenajn:

„La katolika eklezio — diras ni ¹⁾ — havas siajn malhelajn makulojn: la hispana inkvizicio, la Bartolomeo-nokto, la siciliaj vesperoj k.t.p., sed ni forgesis la sennombrajn inkviziciojn kaj Bartolomeo-noktojn de la konstantinopolaj patriarĥoj; *tie* ²⁾ oni havis ian ŝenkulpigon en la epoko, en la moroj de l’ tempo, en la krudelemo de unu malgaja hispana reĝo, de unu pariza reĝino aŭ de unu sicilia reĝo, *kontraŭ kiuj krudelaĵoj la katolika klero ĉiam levis sian*

¹⁾ Scie la skizmiĝintaro.

²⁾ En la okcidenta inkvizicio.

protestan vocon! Sed *ĉi-tie?*¹⁾ Post la falo de la *bizanc*-a imperio la patriarĥeco restis potenco sendependa, tamen kiom da inkvizicioj estis aranĝitaj de li kontraŭ la gentoj venkitaj, kiom da ĉenoj estis forĝitaj en liaj subteraj arestejoj por subpremi la naciojn? Daŭre de longaj jarcentoj la patriarĥoj aprobis la tiranecon, la krudelecon, la barbarecon, kaj ĉiun-ĉi en la nomo de l' ortodoksismo. Tion li faras ankaŭ hodiaŭ. Ĉiam li frunkisis la malhumanajn uzurpintojn de *Bizanc*, kaj aprobis iliajn malŝatindajn kaj hontegajn agojn. La paparo faris tutkontraŭe; kiel ruĝa fadeno, trapenetras ĝian historion ĝia kontraŭstraro kaj batalo kontraŭ la sangverŝoj, krudelaĵoj kaj senhumanaĵoj de l' mondo, kvankam ĝi estis kiel-ajn potencega. *Ambrosio de Milano*, kiu elpelis la sangosoifan grekan imperiestron, *Teodozion* el la preĝejo, pro la sangoverŝado en *Saloniki*, ne sole staras en la katolika eklezio. Kaj li vivis en la epoko de barbaraj moroj; kaj kion diri pri la grekaj patriarĥoj en la XX-a jarcento? — en la epoko de l' progreso, de l' klereco, de l' homaj rajtoj — Jen, je kia sangosoifanta pasio li benis la abundan elverŝon de la senkulpaj sangoj de l' bulgaroj, kaj kiel trankvile li aprobis la krudelaĵojn de siaj barbaraj samsanganoj. Kaj kiam li estas farinta tion? En la XX-a jarcento!"

La artikolo memoras pri *Las-Casas*, la defendinto de l' indianoj, kaj pri *Massilono*, kiu sukcesis timigi Ludovikon XIV-an, kaj daŭrigas jene:

„Kiu trovas similajn ekzemplojn en la ortodoksismo? Kia sovaĝa monstrulo estis *Ivano la Teruriga*? — ortodoksulo ĝis la frenezo... Legu nur *Kovalskijon*! Vere S. FILIPO DE MOSKVO, estas nur nerimarkinda gnomo kompare je *Ambrosio de Milano*.

„Dume la grekaj monaĥoj en *Monto Athos* kaj en aliaj lokoj estis flegantaj nur la sensciencecon kaj siajn grandajn stomakojn, la katolikaj monaĥoj disiris en la mondon, kiel predikistoj de l' Evangelio, kiel misiistoj, kiel semantoj; ili konstruis preĝejojn. starigis lernejojn kaj orfulflegejojn, eltrovis la literojn por blinduloj, (P. EPÈE), kuracadas la

¹⁾ En Phanar.

malsanulojn (P. KNEIPP) esploris kaj priskribis la astrojn, (SECCHI, kaj nune en la observatorio en Bourges: P. MOREUX) Kiom da geologistoj, botanikistoj, fiziologistoj, kiom da matematikistoj, arĥeologiistoj, sociologiistoj troviĝas inter ili! . . .

„La plej karakteriza diferenco estas inter la katolikismo kaj la (greka) ortodoksismo, ke *la unua havas martirojn* de longaj centjaroj ĝis hodiaŭ, *la dua havas renegatajn episkopojn*, turkiĝintajn pastrojn, diakonojn kaj monaĥojn, kaj ĉi-tio estis same daŭre de ĉiuj jaroj, eĉ dum niaj tagoj.”

La sekvintan tagon (27 Sept.) la *Veĉevna Poŝta* riproĉas la troan fierecon de la patriarĥoj de l' ortodoksismo: .

„La disiĝo de l' Kristanaro okazis dum la XI-a jarcento, kaj oni devas konfesi, ke en tiu fakto la grekoj estis la plej kulpintaj. De post la IV-a jarcento la Kristanismo en *Konstantinopolo* ekhavis paganan karakteron, la defendintoj de l' pureco de l' kredo devis rifugi en Romo, kie ili trovis bonan rifugejon. Eĉ plu, la patriarĥo estis sin ornamanta je la titolo OIKOMENIKOS (universestro), dum la papoj subskribas sin de post Leono I: *servus servorum Dei* (servanto de servantoj al Dio). Bonvolu nur kompari la spiritan ŝafaron de l' papoj - 220 milionoj - al la ŝafaro de l' patriarĥoj, kiu nur apenaŭ atingas 250 da miloj, kaj bonvolu klarigi, kie estas la *oecumenicitas!* (universaleco) . . . Tiel traboris kaj trapenetris la grekan kristanisman la paganismo, ke nur malfacile unu de la dua diferenciĝi povas.”

La 29-an de septembro tiu sama oficiala *Veĉerna Poŝta* la jenajn enhavas:

„La leganto vidas, ke mi ne volas trakti pri la diferencoj de l' doktrino de l' katolika eklezio kaj de l' ortodoksismo. En nia epoko estas rimarkindaj ne la dogmaj nuancoj, sed plie la faroj, kiuj estis faritaj sub influo de iu religio. Por vidi, ke en kiu eklezio estas pli da vivo, elmontriĝos el la jena mallonga klarigo. Fine la reunuiĝo *ne postulas radikalan ŝanĝon en la ortodokseco*. Anstataŭ la patriarĥo *Joahimo* aŭ eksarĥo *Jozefo* ni havos *Pion X*.

„*Erare estas diri, ke la katolikismo, se ĝi ĉirkaŭbrakos nin al sia brusto, devigos nin perforte, ke ni uzu la kato-*

likan latinan riton. Tio-ĉi estas malvero, ĉar ni havas unu-
iĝintajn en *Odrin, Kukuĉo, Eniĝe-Vardar, Saloniki*, kaj en
ties ĉirkaŭoj jam de post 50 jaroj, kaj eĉ proponita ne
estis al ili, akcepti la latinajn cerimoniojn. Ilia liturgio
estas slava, ilia rito estas sama, kiel la nia, iliaj preĝejoj
havas altarojn,¹⁾ iliaj diservaj ornatoj estas la samaj, kiel
ĉe ni.²⁾ Kaj krom tio-ĉi, ili legas kaj skribas, ploras kaj
preĝas en sia gepatra bulgara lingvo; kaj tiamaniere, mal-
graŭ ilia malalta nombro, ili helpetas pli multigi la trezo-
rojn de nia literaturo. Dume la grekoj anatemis niajn
apostolojn, S. Cirilon kaj Metodon, kaj per tranĉiloj ili
boris ties okulojn je niaj bildoj, la katolika eklezio ĉiam
honoris ilin kiel grandajn sanktulojn, eĉ pli honoris ilin,
ol ni mem.

„Niaj reunuiĝintuloj vigle partoprenis en la faroj de niaj

¹⁾ La verkinto de l' citita artikolo ĉi-tie ne volas esprimi tion, kvazaŭ la katolikaj temploj en latina rito ne estu provizitaj je *altaro*. *Altaro* en nia lingvo, kaj en la senco, kiun akceptis la latina eklezio, estas la tablo, ĉe kiu la sacerdoto oferas la s. meson, kaj havas tre malsamajn formojn. *Altaro* en la greka-eklezia senco estas la ejo, kie staras la s. *trapezo* (la latina *altaro*), scie la s. tablo, ĉe kiu la s. meso estas oferata. Tiu-ĉi greka *altaro* havas preskaŭ la saman sencon, kiel en latinaj preĝejoj la *sanktejo*, sed diferenciĝas de tio, ĉar ĝi estas apartigita per bildo-muro t. n. *ikonostazo*, de la ceteraj partoj de l' preĝejo.

²⁾ Niaj bulgaraj fratoj povus esti tute certaj, ke Lia Papa Moŝto ne deziras ke ili lasu sian riton. En Hungarujo troviĝas unu ĉef-episkopo kaj sep da episkopaj eparĥioj, kiuj *uzas la saman riton, kiel la bulgaroj*. La arĥiepiskopa eparĥio, kaj 3 episkopaj eparĥioj (1450 paroĥoj) uzas la *rumanan* lingvon, 3 aliaj eparĥioj (526 paroĥoj) uzas la *malnovan slavan* lingvon (tiun saman, kiun uzas la ortodoksaj rusoj kaj bulgaroj) kaj unu eparĥio (163 paroĥoj) la *hungaran* kaj grekan lingvojn en la diservoj (liturgio). Tiuj-ĉi greko-katolikoj eĉ vorton ne lasis ĝis nun el sia orienta rito. Eĉ — se iu memvole ŝanĝus sian riton, ne povas aliĝi al la latinritanoj sole, se la greko-katolika episkopo permesinta, kaj la Roma Seĝo aprobinta estis. Krom Hungarujo multnombro troviĝas unuiĝintaj orientritanoj en *Aŭstruja-Polujo (Galicujo)* kaj en *Italujo*. En *Galicujo* estas la *slava* rito uzata, en *Italujo* la greka.

regimentoj en Makedonujo; forte ili batalis pro la bulgara nomo en ambaŭ militoj... kio nune disigas nin de tiuj bonaj bulgaroj? Unika vorto! Do disfalu ĉi tiun solan malhelpaĵon, kaj kune kun ili, ankaŭ ni enpaŝu en la ĉirkaŭon grandan de l' Europa civiliziteco. Savu nin mem el la mallarĝa rondo de la mezepokaj konvencioj, kaj enŝpiru la puran aeron de libereco.

„Granda estis nia sufero, longa estis nia atendado, kaj jen, ni estis simplaj pekoferoj de ili, por la ortodokseco kaj slavismo, kiu kostis tiom da suferoj, kaj vivon de centmil da niaj viroj. Abomene ni forĵetu la devizon: „Pli volu la turkan turbanon, ol la papon tiaron!” Ĉar la nacieco estas tre kara por ni, — por savi tion, ni iru la vojon, kiun iras la pli bona, pli inteligenta kaj pli kleriĝinta duono de l' homaro...”

La gravaj artikoloj trovis siajn efikojn. Tion atestas la *dimanĉaj kunvenoj*. Nek unu el la sociaj klasoj estis sen reprezentanto en tiuj gravaj kunvenoj, kiuj pritraktis la aferojn de l' reunuiĝo.

La 26-an de oktobro okazis la unua *dimanĉa kunveno* kaj la 2-an de novembro la dua. Ĉeestis ortodoksaj pastroj, profesoroj, oficistoj de militistaro, komercistoj k.t.p.

En la unua kunveno la fama bulgara arĥeologiisto Mirko *Marinov* elmontris, ke la eklezia unuiĝo estas la sola ilo por savi la makedon-bulgarojn. Forlasu la ekleziajn formojn ĝis nun uzatajn, kaj rekonu la estrecon de l' papo! La papo, kiu havas ankaŭ politikan influon krom la eklezia potenco, ne permesos, ke la bulgaraj preĝejoj kaj lernejoj en Makedonujo estu malkonstruitaj. Je sama senco parolis advokato D-ro GRABJASCO kaj regimentestro S-ro MIHAJLOVSKY, kiu jene finis sian entuziasmoplenan paroladon:

„Hodiaŭ, kiam Bulgarujo batalas por vivi aŭ morti, estas rajte, ke ni interrompu niajn ĉiujn rilatojn al la rusa ortodoksismo, por ke ni trovu manieron por savi nin mem. La unikan manieron de l' savo ni konsideras esti en la reunuiĝo. Por pli fortigi ĉi-tiun movadon, estas necese, ke *la bulgara s. sinodo prenu la gvidadon de l' movado*”.

Unu instruisto, Nikolao STANEV malaprobis la ekpenson

de la unuiĝo. Li timas, ke Rusujo estos ankoraŭ pli malamika al Bulgarujo post la unuiĝo, ol nune. La kunveno tute malaplaŭdis lian paroladon.

En la dua kunveno ĉeestis multe pli, ol en la unua. La bulgara verkisto Nikon SOFRONY en belega parolado klarigis, ke la bulgara gento devas unuiĝi al la Roma eklezio. Ekleziaj, sociaj kaj naciaj motivoj postulas la unuiĝon. La bulgara popolo nur tiamaniere povos gardi sian memstarecon.

Majoro SALABASEV entuziasme deklaris, ke nur per la unuiĝo Bulgarujo prosperos. Lia parolado estis interrompita per entuziasmaj krioj tre ofte: „Akceptu la reunuiĝon!” La eksa lernejinspektoro de la distrikto *Vodena*, S-ro Kristoforo NEJKOV elmontris, ke 65.000 da bulgaroj kaj nur 12.000 grekoj vivas en la *Vodena*-distrikto. Tamen la grekoj klopodas subpremi la bulgarojn per fero kaj fajro.

„Gefratoj! — li finis sian paroladon, — Ne estas permesite, ke ni lasu pereii ĉion, sur tiu sankta teritorio, kio estas bulgara. Ni ne povas rigardi senfare, ke sur la teritorio, kie nia unua historioverkisto P. PAISY instruis, kie la unua bulgara presejo estis starigita, kie episkopo *Klemento* kaj caro *Samuelo* vivis, oni ekstermu la bulgaran lingvon, kaj disvastigu la grekan. Tial same ni devus fari interligon kun Romo, kaj akcepti la unuecon. Tiamaniere ni tute disiĝos de la serboj, grekoj kaj rumanoj, kiuj deziras nin asimili!”

Fine parolis la bulgaro katolika profesoro S-ro ĈAFLIKOV, kiu elmontris, ke nur malgrandaj diferencoj estas inter la katolikaj kaj ortodoksaj dogmoj, kaj tial la popolo facile povas akcepti la katolikecon.

Fine la kunveno decidis starigi nacian ligo por prepari la reunuiĝon. La nacia ligo petis la registaron kaj la pastraron por energie subteni la unuiĝajn movadojn.

*
*
*

Jen, la gravaj faktoj, en kiuj mi sentas, ke niaj katolikaj gesamideanoj ne vane preĝis. Precizan statistikon ni ne havas. Ni nur scias, ke en Makedonujo naŭ eksarĥanaj episkopoj loĝas, scie en *Ŭsküb*, *Veles*, *Monaster* kaj *Vehrida*

(sub serba regado), en *Karaferia*, *Kukuća*, kaj *Seres* (sub greka regado) kaj en *Neurokop* kaj *Strumica* (sub bulgara regado). La eksarĥana loĝantaro en ĉi-tiuj naŭ eparĥioj estas proksimume 1.800.000; se ni aldonos la ortodoksulojn de Bulgarujo, ni konvinkiĝos, ke la unuiĝo movado, se sukceson havos, *pli altigos la nombron de l' orientaj katolikoj proksimume je 5 milionoj*.

Ĉu ne ĝojiga espero?

Nur kelkajn vortojn mi aldonas.

Gesamideanoj! Jen la favora okazo ankoraŭ pli fervore efektivigi la cititan deziresprimon de nia *budapesta* kongreso. Per la Esperanto ni povus tre antaŭenpuŝi la progreson de l' katolikemaj sentoj. Nur ne domaĝu iom da laboro, iom da preĝado, kaj iom — da mono.

Jen miaj proponoj.

Niaj katolikaj gesamideanoj *komencu korespondadon kun bulgaraj gesamideanoj*. Klopodu elmontri en leteroj la bonojn kaj benojn de l' reunuiĝo, ĉu spiritajn ĉu materiajn. Kaj se oni spertos ian katolikemecon, oni entuziasmigu la bulgarajn gesamideanojn, kaj persvadu ilin, por ke ili varbu novajn anojn por la ideo de unuiĝo, katolikiĝo.

Diskonigu inter ili nian karan gazeton, Espero Katolika, kaj per via konstanta laboro ebligu, ke E. K. estu en la favora situacio *dissendi senpagajn numerojn en Bulgarujon*, kaj disdonigi broŝurojn, kiuj antaŭenmovus la reunuiĝan movadon. (Tial varbu novajn abonantojn!)

Kaj fine *preĝu, preĝadu, senĉese, seninterrompe!* Kaj kredis, ke fariĝos, kion ni petas ke ĝi efektive fariĝu laŭ la Krista promeso.¹⁾ La cirkonstancoj estas favoraj, eluzu por savi milionojn da animoj!

¹⁾ Mat. XXI, 22.

EĤOJ DE LA KATOLIKA KONGRESO EN ROMO.

Koloseo.

(NOKTA VIDAĴO).

Luno lumigis, per lumo argenta,
Grizajn ruinojn de l' cirkmonumento;
Ombroj vagadis tra helaj ruinoj,
Ombroj de viroj kaj de virgulinoj.
Kantoj sin levis al blua l'aero,
Kantoj, neniam aŭditaj sur tero,
Plenaj je dolĉa ĉielharmonio,
Kiel kantadas l'anĝeloj al Dio.
Kaj mi, vagante, pripensis kun emo:
Sango martira, milobla, vi, semo:
Vi ja semiĝis dum longaj jarcentoj,
Kaj vi produktis la pacon de l' gentoj!
Sango kristana, ekzemplo vivanta,
Al vi revenos l' homar' doloranta;
Viajn virtegojn bezonas l' homaro,
Por ke ĝi iĝu de nove frataro.
Sur Koloseo, moderna, ruina
Nova sin levu arkaĵ' Konstantina.

Roma, 5-9-13.

Oscar VAN SCHOOR,
Antwerpen.

FORO ROMANO.

Sic transit...

Kie vi estas, granduloj de l'tero,
Imperiestroj de monda la sfero,
Kiu per grandaj, vastegaj arkaĵoj,
Temploj, palacoj kaj lukskonstruaĵoj,
Volis por ĉiam konigi en rondo
Ke vi fariĝis la estroj de l'mondo?
Dioj, Diinoj de l' mondo de Romo,
Nur elpenaĵoj de l' cerbo de homo
Sen ia forto, sen volo ajn ia,
La ruiniĝon de l' regno la via

Vi rigardadis, kaj sen kontraŭstaro,
Vidis vi, kiel, dum jaro post jaro,
Fido kaj kredo al vi, el la gentoj,
Tute forflugis kaj la monumentoj
Ĉiuj disfalis; silento atestas
Vian vantekon; ruinoj nur restas,
Kiuj sciigas, el fundo de l'Foro:
„Tiel forpasas de l'mondo la gloro!

Romo, 5-9-13.

Oscar VAN SCHOOR,
Antwerpen.

LA VENĜO DE PATRO NOC.

De Mario Amelio baronino de Godin.

Li, kiun oni de Janina ĝis Korica, de Elbasan ĝis Berat kaj de Berat ĝis Argirokastro kaj Delvino nomis „la longa Gjerk”,*) iris dum Paskodimanĉo Janina'n en la preĝejon.

„La longa Gjerk” li estis nomita, ĉar lia longo estis ĉirkaŭ unu metro kaj okdek centimetroj, kaj la nigra ŝafpelto ĉirkaŭvolvanta lin de la ŝultroj ĝis la genuoj donis al li ion gigantecan. Sed gracia li estis kaj lerta kaj ankaŭ facilmovi! Por la festo li estis veninta de ursoĉasado sur la montoj de Samarina, iom, ĉar oni dum tiel gravaj festotagoj ja iras en preĝejon, kiam oni povas ebligi tion, sed ĉefe, ĉar li aŭdis, ke Patro Noc,**) kiun ili antaŭ nelonge pastrigis, predikos dum la Paskofesto.

La longa Gjerk kaj Patro Noc, ili konis unu la alian de infanotempo, ĉar ili ambaŭ devenis de la sovaĝaj montoj de Alt-Albanujo, de kiuj la pastro venis antaŭ nelonge, por pastri, kaj la longa Gjerk jam antaŭ jaroj, por eviti persangan venĝon — kaj ĝuste la persangan venĝon de Noc.

Ĉar komencinte de ilia junuleco, ili ambaŭ sin malamis reciproke. Kiam Gjerk eĉ nur ekpensis la motivon de tiu malamo, liaj okuloj ekfulmis kaj lia mano ekprenis la

*) Gjerk: Georgo. — **) Noc: Antono.

ponardon, kiun li ĉiam portis sub la ŝafpelto en maniko de sia jako. Antaŭ dek jaroj la fratino de Noc estis la edzino de Gjerk kaj Gjerk tiam dum disputo mortpikis ŝin. Li kunmordis la lipojn, kiam tio venis antaŭ la okulojn de lia animo, ĉar — Dio scias — en tiu disputo li estis prava kaj ŝi malprava. Dum vojaĝo de Gostivar Kalkandele'n ŝi, sciu, ĉiam rigardis al kuzo akompananta ilin; post kiam ili tiam estis alvenintaj, Gjerk riproĉis ĝin al ŝi — ŝi obstinis — kaj tiam Gjerk puŝis la ponardon en ŝian koron. Ĉu li estus Albano, se li ne gardus la honoron de sia domo?!

Sed la tuta gento de lia edzino sin levis kontraŭ li. Unu semajnon post lia faro, Noc, kiu nun estas pastro, mortbatis la patron kaj la fraton de Gjerk; kie ajn Gjerk iris aŭ staris, oni spionis post li, tial li fine forkuris Sud-Albanujon.

Nun tie ĉiu sciis pri lia braveco, pri la freneza kuraĝo, kun kiu li ĉasadis, kaj efektive estis mirinde, ke la famo pri Gjerk, kreskanta de jaro al jaro, ne venis ĝis la gento de Noc, tiel ke ilia venĝo ne ankaŭ en la suda parto de la lando atingis lin.

Pri tio Gjerk iutempe ekmiris, memorante la okazintaĵojn, kiuj forpelis lin el la hejmo, kion li eĉ ne bedaŭris, ĉar li amis sian senkatenan vivon de ĉasado — tial li ankaŭ nur malofte repensis pri ĉio tio. Pli ol por iu ajn Albano estis por li pafilo kaj ponardo la plej intimaj amikoj.

Sed malgraŭ tio — kiam li antaŭ kelke da semajnoj ree aŭdis pri Noc kaj sciigis, ke tiu fariĝis pastro, la scivolo venis super Gjerk'on kiel ebrio; li nepre devis revidi sian malamikegon en altaro, revidi lin ĝuste en la preĝejo! Kial ĝuste tio efektive instigas lin, tion Gjerk ne povus diri, ĉar, se li ja sciis persekuti postsignojn de ĉasaĵo, se li eĉ laŭ la plej malforta piedsigno en neĝo aŭ tero divenis la specon de besto — en la animoj de homoj, en sia propra kaj en la animoj de aliaj, li ne trovis vojon; animo de homo kun siaj milspecaj afektoj estis por li fremda nekonata lando.

Nun li apogis sin je ligna kolono proksime al la preĝej-

opordo, alten sin levinte, firme volvinte sin en sian ŝafpelton, kaj li ne movis sin, apenaŭ okulharo movetiĝis. Lia rigardo glitis super la vicoj de preĝantoj alvenintaj iom post iom por la festa Diservo, super la viroj en vastaj malhelaj faldoriĉaj manteloj, broderitaj aŭ ne broderitaj, laŭ riĉeco kaj rango — super la kapoj de tiuj Sud-Albanoj, super la longaj vicoj de virinoj en blankaj vualoj altigitaj super la harligoj, profunde sin teren klinantaj — ĝis la altaro kun ĝia malriĉa ornamo, en malforta lumo de ĝiaj malmultaj kandeloj, kaj ĝi haltis sur la statuo de l' Reviviginto, kiu kronis la ĉefan altaron. Mizera statuo ĝi estis, en akrekolora blua mantelo, kun akruĝa standardo el papero en la dekstra, dum la maldekstra estis levita benante, kiel montrante la savigan vundon.

Da ĉiuj tiuj detaloj Gjerik efektive vidis neniom, liaj lipoj ridetis, ĉar li imagis en sia spirito Noc'on, kiu nun tuj aperos sur la predikejo. Klare li volis observi lin; bonŝance la suno hele brilis tra la malgrandaj preĝejofenestroj, oni do bone povos ekkoni, ĉu Noc havas ankoraŭ tiun saman delikatan vizaĝon de knabino, kian pli frue, kiu tiom diferenciĝis de la kuraĝplenaj trajtoj de Gjerik.

Kial Gjerik ridetas, tion li mem ne sciis precize. Saman senton li havis, senton de ebrieca ĝojo, kian li havis, sciante urson sensuspektan antaŭ la tubo de sia pafilo; ĝi instigis kaj tiklis lin, ke li renkontos viron evititan dum dek jaroj pro savo de sia propra vivo. Gjerik povos observi Noc'on dum du horoj, oportune, precize, kaj tiu nenion scios, nenion divenos de tio.

Jen, malpeza paŝo sonoris sur la ŝtuparo de la predikejo, tio estis la paŝo de Noc, paŝo mallaŭta kaj senbrua kaj facilmovi — nun blonda verto vidiĝis, nun la tuta vizaĝo, nun ŝultroj kaj brakoj de l' pastro aperis super la balustrado de la predikejo.

Gjerik'on io trakuris de verto ĝis plando kiel frapo; jes, jes, ĝuste tiun saman knabinan vizaĝon Noc havis ankoraŭ, tiujn samajn bluajn okulojn de kolombo, kiujn Gjerik ja membris ekfulmintaj en soifo pri sango kaj en avido de mortigo, tiel, ke ili subite fariĝis kiel la okuloj de alia.

Nun ili vagadis super la amaso, kiu pretiĝis por aŭskulto; mallonga paŭzo — kaj la pastro komencis: „La paco de la Reviviĝinto estu kun vi!”

La paco, pensis Gjerk, se li scius, ke mi staras ĉe liaj piedoj. Tio efektive ŝajnis preskaŭ gaja penso por li.

Per mallaŭta voĉo, kiu estas apartaĵo de Albanoj, la pastro sur la predikejo daŭrigis paroli pri la paco, pri tiu paco, kiun la Reviviĝinto alportis al la homoj, kaj pri la amo, kiu pro Li ĉiujn devus kunligi kiel fratojn.

Gjerk ekaŭskultis kaj tiam subite moko ĉtremetis ĉirkaŭ liaj lipoj, ĉar la pastro diris: ”Kelkfoje estas, kvazaŭ la leĝo de paco kaj de amo ne valorus por ni Albanoj, ĉar ni nenion scias pri paco, nenion ni volas scii, vivo ŝajnas al ni bela nur kun pafilo en mano, kun aventuremo en koro, eĉ du, kvar, ses, eĉ dek el niaj samnacionoj falu kiel ĝiaj viktimoj. Vere, nia vivo estas vojo de aventuro al aventuro, de batalo al batalo, kaj kiu el ni komprenis la doktrinion de la Reviviĝinto? Kiu el ni volus, ke estu alie? Ne, pacon ni ne konas; por savi iun ajn, volonte ni devus fordoni nian vivon, sed ni, ni mortbatas, pro nia stranga, severa, malmola honoramo, fraton kaj fratinon, kaj ĉiu mortbato ja estas perfido je Kristo.”

Tiu hipokritulo, pensis Gjerk, kiom li mensogas kaj trompas; kaj dum Gjerk pensis tion, lia mano ekkaptis la pafilon en lia zono: — nun mortpafi tiun, kiu parolis pri amo, kaj kies manoj tamen gutadis de sango de proksimulo!

Sed jen, la pastro sur la predikejo diris ion, kio halti ordonis al Gjerk, kaj kio ankaŭ en la ceteraj aŭskultantoj sufokis la koleron, kiu estis vekigonta en ili: „Mi estas Albano, kiaj vi, en miaj vejnoj frapas la sovaĝa sango de Alt-Albano, miaj manoj estas eble pli kulpaj ol viaj”, — dum tio la pastro etendis la blankajn delikatajn manojn, kvazaŭ li volus ĉiujn alĵuri, ke ili ja aŭskultu liajn vortojn kaj akceptu ilin en siajn animojn; liaj okuloj dum tio havis brilon preskaŭ superteran. „Se vi pekis kiel mi, mi alĵuras vin pro la Reviviĝinto, klopodu penti, kiel mi klopodis penti! . . .”

Kion pluan la pastro diris, da tio Gjerk aŭdis nenion,

li repuŝis la pafleton en la zonon kaj interplektis la brakojn, por mediti pri ekpenso, kiu subite venis al li kaj kiun efektivigi li sentis sin instigata kiel dum trokuraĝaj ĉasoj sur la krutaĵoj de Samarina.

Ĉiam ree li pripensadis — tiu penso Gjerk'on ensorĉis, tute okupis kaj jam ne ellasis lin. Gjerk sciis, ke la penso estas freneza, la plano sovaĝa — aŭ, ĉu ĝi tamen ne estis tia?

Gjerk aŭdis jam nenion de la fino de l' prediko, sed li ankaŭ apenaŭ vidis, kiel Noc diris la meson — pli frue ol ĉiuj li iris el la preĝejo, kaj ekstere, antaŭ la pordeto de la sakristio, li stariĝis en tuta sia alto. Tie Noc devis pasi lin. Minuto post minuto pasis, la lago antaŭ la piedoj de Gjerk briletis, kaj ĝia lumado kaj briletado igis kreski la malpaciencon de l' ĉasisto, kiel ankaŭ la alfluo kaj la refluo de la ondetoj ec pligrandigis ĝin.

Fine, fine la pordo estis malfermata, kaj la blonda pastro staris antaŭ Gjerk. „Noc”, tiu kriis. La juna pastro rapide sin turnis, alrigardis Gjerk'on per grandaj rigidaj okuloj — kaj malrapide lia mano prenis al la ponardo, kiun ankaŭ li ĉiam kunportis.

„Jes, estas mi,” diris Gjerk, „rigardu min, ekpuŝu, se vi volas, sed vi ne faros tion, vi pacema, vi amema”. Moko preskaŭ sufokis lian voĉon.

„Silentu,” la alia raŭkavoĉe interrompis lin, metante la manon, kiu forlasis la ponardon, sur lian brakon, „ne incitu min! Ĉu ne sufiĉas, ke mi dum ĉiuj tiuj jaroj ne persekutis vin, ke mi retenis mian genton spioni post vi, kvankam mi sciis, ke vi estas inter Samarina kaj la marbordo?”

Sed Gjerk daŭrigis moki: „Mi ja ne incitas vin, mi ja nur parolas kun vi, tion vi, kiu tiel eminente scias paroli pri la Reviviĝinto, ja povos toleri. Ke vi estas mortbatinto, tion mi scias, ĉu vi estas hipokritulo, tion mi dezirus scii; mi diros ion al vi, Noc,” kaj la mallaŭta voĉo de Gjerk nun klukis pro emocio, „tie transe estas kavernoj, ĉu vi vidas ĝin trans la lago en la hele superbrilata montomuro? Ĝis tiu mi irados antaŭ vi, mi ne movos min, mi ne retur-

nos min. Ekpuŝu, kiam vi volas, sed, se vi prenos sur vin, kion mi nun diros al vi, se mi sendifekta alvenos tie supre, mi kredos je la vortoj de via prediko.”

Neniun pluan silabon li aldiris, kaj la alia nenion rediris.

La okuloj de Gjerk glitis ankoraŭ unufoje mokeme kaj plenaj de malamo super la palan vizaĝon de lia malamikego, tiam li sin turnis kaj malrapide, per tute gravaj paŝoj, kun la soleneco de Albano, li ekiris al la celo en la montomuro. Gjerk aŭdis, ke Noc lin postiras, kaj liaj fingroj sin krampis ĉirkaŭ la pafileto, ĉar, Dio scias, se la alia ekpuŝis, per sia lasta forto li venĝos sian vivon je tiu; se tiu lin ne maltrankviligos – sed tio ja ne estis ebla.

Stranga sento supervenis Gjerk'on; kion li ja efektive estis entrepreninta? Sin mem li estis strariginta antaŭ la ponardon de sia malamiko, kiun li tiel obstine estis evitinta — pro kaprico, pro freneza kaprico. Certe tiu ekpuŝos, eble nun tuj!

Gjerk ne returnis sin, li ne rapidigis siajn paŝojn — Albanoj ja scias morti — sed li sentis sin iranto sur lasta vojo. Li rigardis la sunon: Kiam ĝi staros en zenito, li pensis, mi estos morta, kaj kiam la ombroj malleviĝos super la montojn, la urbon kaj la lagon, mi estos malvarma.

Li aŭdis la paŝojn de Noc. Li kaj lia persekutanto ĵus suprenrampis sur la deklivo, kaj Gjerk aŭdis ankaŭ, ke la juna pastro forte kunpuŝas la dentojn.

Kiom plena da malamo li estas, Gjerk pensis, kaj li ĝojis, ke tiel la malsincereco de lia malamiko evidentiĝas, li ĝojis, kvankam tio signifis sian propran vivofinon — kaj tiam li ekmiris de paŝo al paŝo, de minuto al minuto, ke, spite tio, nenio okazas.

Se li nur unufoje estus rigardinta post si, li estus vidinta la junan pastron irantan post li kun klinita kapo — li estus ankaŭ povinta observi en la malgranda delikata vizaĝo la animan batalon de sia malamiko, la internan emocion, kiun subpremi Noc klopodis.

Tio ĉi terura estas mia pento, pensis la juna pastro, kiel mi povis pensi, ke mi pentis, ne povante, pro la Reviviĝinto, rigardi ankaŭ tiun kiel mian fraton, kiel mi povis,

antaŭ ol fari tion, paroli en la preĝejo antaŭ ĉiuj kreduloj pri mia pento?

Jam longe ili ambaŭ estis pasintaj duonon de sia vojo, nur proksimume cent paŝojn ankoraŭ malproksimaj de la pinto de l' montodeklivo superbrilata de la suno, kiam la pastro ekprenis sian ponardon kaj ĝin forĵetis malproksimen de si; tintante ĝi falis super la ŝtonegoj valen! Gjerk ja aŭdis tion, sed li ne komprenis ĝin -- tiu eltiris sian tranĉilon, li pensis, kaj dum tio li perdis la tranĉilingon. Dum la sekvonta sekundo nun la ekpuŝo devis okazi, Gjerk ne povis kompreni, ke ĝi ne okazas.

Sed per tio, ke la juna pastro forĵetis sian ponardon, lia interna batalo ankoraŭ ne estis finita; li rigardis siajn manojn kaj li sciis, ke ili estas manoj malmolaj kiel ŝtalo, kaj li pensis, ke li povus sufoki la mortiginton de sia fratino, ke en lia hejma lando naŭdek naŭ viroj el cent lin insultus senkonscienculo, se li tion ne faris. Sed nur dum unu momento li pensis tion, tiam liaj manoj interplektis kaj firme tenis sin.

Gjerk dum tio estis veninta ĝis kelke da paŝoj al la groto, ĉiuj liaj pensoj kaj sentoj estis cedintaj antaŭ tiu sento de ne priskribebla miro pri io stranga, mirinda; la sunobrilo kaj la rebrilo de la lago, ĉio tio penetris en la animon de Gjerk kiel lumo de io supertera, kion li ĵus ĉeestas. Sed tio ja ne estis ebla, ne pensebla. Noc sen dubo atendas ankoraŭ ĝis la lasta momento, ĝis la plej lasta. Spiro ekmankis al Gjerk, la lastajn sekundojn de sia vivo travivi kun konscio, tio estas io stranga, kio kiel fingroj prenas al la gorĝo. Kiam ankoraŭ nun nenio okazis, Gjerk pensis: Kio estas tio? Kio estas tio? Kaj lia koro tremis, ne pro la danĝero, sed pro la grandiozo, kiun tiu horo alportis al li. Nun la piedo de Gjerk ektuŝis la randoŝtonon de la kaverno, nun li returnis sin, nun li vidis al sia malamikigo — kaj trovis en ties vizaĝo rebrilon de tiu paco, pri kiu la juna pastro estis parolinta en sia Paskoprediko.

Tiam Gjerk eksurgenuis: „Patro”, li petis, „pro la Revi-viĝinto, benu min!”

Kaj la juna pastro metis ambaŭ siajn tremantajn manojn sur lian kapon.

Esperantigis Joh. SCHRÖDER,
Wien (Aŭstrio).

Vera Rakonto.

Ĵus la pastro finis sian matenmanĝon. Li estis promenanta en sia ĝardeno, kiam li ekvidis, malproksime, polvonubon. Dum li rigardis, la polvonubo alproksimiĝis. — Tiam li rekonis (tute kiel li konjektis) rajdanton alflugantan tiel rapide kiel povis lin porti la ĉevalo. Oni rajdas rapide, en Texas, sed tiu viro galopis tiel fulme, tiel furie, ke la pastro tuj komprenis, ke okazis ia malfeliĉo. Tuj li eliris renkonte al la rajdanto.

Ili ŝajnis tutaj epokoj, tiuj dek minutoj inter la momento, kiam li unue ekvidis la rajdanton, kaj momento, kiam fine la viro senspire haltis antaŭ la pastro.

„Kien?” kriis Patro Pat eĉ antaŭ ol la ĉevalo haltis.

Li ja divenis, ke iu malsanas, kaj, en tiaj okazoj, ne Patro PAT perdis tempon.

„Farmodomo Crosskeys”, vokis la viro; „Patro, pro Dio, rapidu, alie vi alvenos tro malfrue... Mia edzino... ŝi terure malsanas. Kunprenu vian plej fortan ĉevalon, kaj mi donos al vi alian, se ĝiaj fortoj ne sufiĉas.”

La Pastro ne prenis tempon por respondi. Li flugis al la kapelo, kriante survoje al sia servisto Jozef seli „Zingbron”.

Ne unuafoje la maljuna Jozef tiel rapide selis ĉevalon por la bona Patro: post tri minutoj „Lia Reverenco” jam surseliĝis kaj ekgalopis sur la vasta herbejebeno. Tiam komencis tiu rapidado, kiel sendube al ĉiu pastro okazas iam en sia vivo, — al kelkaj oftege, — sed al ne multaj kun la malfacilaĵoj renkontotaj de Patro Pat en tiu tago.

Komence, ĉio estis facila. Kun tremiga rapideco li antaŭenflugis, kvazaŭ „Zingibro” konus la celon, kaj la necescon alveni ĝustatempe. Sed subite ĝi haltis. Tiel subite,

ke nur la granda sperto de la rajdanto malhelpis lin fali super la kapo de la ĉevalo. Malkviete la Patro ĉirkaŭrigardis, kaj jen, ĉirkaŭe tridek „jardojn” antaŭ li vidiĝis du grandegaj panteroj — unu sur ĉiu flanko de la vojo, kaŭrantaj por alsalti ĉe lia pasado. En tiaj okazoj, hezito estas fatala. Sed Patro Pat ne hezitis eĉ unu momenton. Li kaptis la „pyx” per sia maldekstra mano, la revolveron per la dekstra, premante samtempe la gvidilojn inter la dentoj. Post mallaŭta alvoka vorto al la Dio, Kiun li portadis al la mortanta virino, li pikis per la spronoj, kliniĝis super la kapo de l’ ĉevalo, kaj la nobla besto antaŭenĵetis sin same subite, kiel ĝi antaŭe haltis. Ĉio tio okazis en unu momento, sed al la pastro ĝi ŝajnis longa kiel tuta tago. Tiel surprizitaj estis la panteroj, ke jam la rajdanto preterpasis, antaŭ ol ili havis tempon salti.

Antaŭen, antaŭen rapidegis la ĉevalo, kun la du sovaĝaj bestoj persekutantaj ĝin, — antaŭen, antaŭen, ĝis kiam ŝajnis, ke la kompatinda besto falos. Fine unu pantero, kaj poste la alia ĉesis la postkuradon, kaj malaperis en la arbeto.

Sed eĉ tiam — kaj memoru, ke tio estas vera rakonto— restis aliaj danĝeroj por la pastro. Antaŭ lia alveno al la farmodomo de „Crosskeys” li devis trapasi riveron, kaj lia malfeliĉa ĉevalo estis tiel varma de la kurado, ke por ĝi estis serioza danĝero malvarmumiĝi en la akvo. Sed la pastro ne havis tempon zorgi pri tio: la virino estis mortanta, por li tio sufiĉis. Senĉese li do incitis la ĉevalon, trans la riveron, kaj sur la alia bordo. Tute elĉerpita ĝi nun estis. La malfeliĉa pastro komencis dubi, ĉu li ĝustatempe atingos la virinon, ĉar malrapida estis nun la irado: videble la ĉevalo malfortiĝis.

La tutan tempon la bona pastro ripetadis la „Saluton Maria”, preĝante, ke li alvenu sufiĉe frue; kaj ĝuste en la momento, kiam li komencis timi, ke la ellacigita besto ne povu iri du pliajn mejlojn, li ekvidis, de malproksime, la farmodomon. Ankoraŭ pli feliĉe estis, ke de la farmodomo oni ekvidis lin; kaj la filo de la farmisto alvenis renkonte sur freŝa ĉevalo. Pro lia rapidiro, la pastro komprenis,

ke la afero urĝas; li incitis la kompatindan elĉerpitan beston fari lastan klopodon. La kuraĝa ĉevalo nerve relevis la kapon, kaj per siaj tutaj fortoj faris lastan provon galopi, sed post ĉirkaŭ cent „jardoj” ĝi falis, mortinta.

La pastro iom ekspektis tion. Li desaltis teren. Tuj poste algalopis la junulo kun freŝa ĉevalo. Preskaŭ sen unu vorto, li desaltis de la selo, la Pastro anstataŭis lin, kaj dek minutojn poste Patro Pat estis ĉe la lito de la mortantino kaj donis al ŝi absolvon. Ŝi ĝustatempe ricevis la Sanktan Viatikon, — kaj tiam pace elspiris kun rideto sur la lipoj.

Tiel okazas, en Texas, vizitoj al malsanuloj.

RAMO.

(*Tradukita el „The Catholic Junior”*).

Notoj pri Lourdes, la lando de mirakloj.

Antaŭnoto. — Mi skribas tiujn notojn pri Lourdes, la lando de mirakloj, speciale por la legantoj de „Espero Katolika”. Mi ne intencas doni kompletajn sciigojn, nek verki literaturaĵon, sed simplajn notojn, kiuj konigas Lourdes, kie okazos la V-a Katolika Esperantista Kongreso kaj kiuj povas esti utilaj al la kongresanoj, same kiel gvidlibro.

Mi dediĉas tiun verketon al la Senmakula Virgulino, Patrino de Dio.

I.

La aperoj.

En la mil okcent kvindek kvara jaro, granda lumo leviĝis sur Romo, la eterna urbo: Eminentia Papa Moŝto Pio IX-a proklamis dogmon la plej kontraŭan rilate al la malĉastaj filozofioj de la deknaŭa jarcento: dogmon de la Senmakulino.

Tiun dogmon liaj antaŭuloj ne devigis al epokoj de Kredo, Pio IX-a sentime ĵetis skandalon de tio al niaj nuntempaj judoj. „Judaeis scandalum”.

Rimarkindaj mirindaĵoj devis subteni similan difinon. Miraklo ne mankis. Dio, tiufoje, sin turnis al knabineto

simplanima, mallerta, nescianta, kaj estas al ŝi sola, ke la Sankta Virgulino sin montris, antaŭ nombrego da ĉeestantoj, por diri al ŝi tiujn parolojn, kiujn popolamaso ne aŭdis: „Mi estas la Senmakulino”.

Estis la dekunua de Februaro mil okcent kvindek ok, kiam la Senmakulino metis siajn piedojn sur Franca tero, ĉe Lourdes, por malfermi tie la novan epokon de kompato, epokon de multhomaj pilgrimoj, epokon de Lourdes.

La Senmakula Virgulino montriĝis al Bernadette ĝis dekok fojoj.

Dum la tria apero, kiu okazis la dek oka de Februaro, la Sinjorino, same kiel ŝin nomis Bernadette, diris al la knabineto: „Donu la plezuron al mi veni tien ĉi dum dek-kvin tagoj... Mi deziras vidi tie ĉi multajn personojn”.

Pli da cent personoj kaj la gepatroj de Bernadette ĉeestis la kvaran aperon.

La dudekunua de Februaro la Sinjorino diris „Estas necese preĝi por la pekuloj”.

La dudek kvina de Februaro, dum la naŭa apero, la mirakla fonto ŝprucis. La sekva tago okazis la unua resaniĝo mirinda de ŝtonhakisto Bouriette, kies la okulo estis malsana de post dudek jaroj.

La kvara de Marto, dum la dekkvina apero, la Sankta Virgulino petas denove preĝejon kaj procesiojn. Pli ol dudek miloj da personoj ĉeestis sur la bordo de l' torento.

La dudek sesa de Marto, la Sinjorino fine respondas al petegoj de Bernadette, kiu demandis al Ŝi ŝian nomon: „Mi estas la Senmakula Konceptiono”.

La sepa de aprilo, dum la deksepa apero, la manon de la vidantinto kontaktis flamo de vakskandelo dum kvaron-horo, kaj ŝi ne sentas la plej negravan doloron.

La fina apero okazis la deksepa de Julio.

(Daŭrigota.)

Max ROUB.

Oficialaj Komunikoj.

KONGRESREGULARO.

Projekto.

§ I. I. K. U. E. *celas* per katolikaj internaciaj Kongresoj priparoli internacian kunlaboron por servi la katolikismon laŭ aprobo de la Eklezia Aŭtoritato.

§ II. *Priaranĝoj antaŭkongresaj.*

1. La traktotaĵoj de la kongreso estu:

- a. temoj proponataj de la Estraro de I. K. U. E.
- b. proponoj de I. K. U. E.-anoj, de E. K.-abonantoj aŭ de kongresanoj.

Al ĉiu temo kaj propono estu aldonata deziresprimo.

2. La proponoj de sub b. devas esti komunikataj al la ĝenerala Sekretario kvin monatojn antaŭ la 1-a de la kongresmonato.

3. Post zorga esploro la Estraro de I. K. U. E. kunmetas programon el ĝiaj propraj temoj kun la aprobitaj proponoj de sub b. Ĉiu malaprobita propono estos resendata al ĝia aŭtoro sen deviga motiviĝo.

4. La provizore fiksita programo estos sendata al la Episkopo, en kies eparĥio okazos la kongreso.

5. Poste la Estraro de I. K. U. E. presigos en E. K. kiel eble plej baldaŭ la resumojn kaj deziresprimojn episkope aprobitajn.

6. Ĝis du monatoj antaŭ la kongreso la membroj de aliĝintaj Ligoj havas rajton ensendi al la ĝenerala Sekretario ŝanĝ-proponojn.

7. En la lasta antaŭkongresa numero de E. K., se eble, la estraro presigos la de ĝi akceptitajn kaj Episkope aprobitajn ŝanĝojn.

8. La estraro de I. K. U. E. disponigos por disdono en ĉiu kunsido de la kongreso presitajn resumojn, deziresprimojn kaj ies ŝanĝojn.

§ III. *Priaranĝoj dumkongresaj.*

1. La Estraro de I. K. U. E. estu la kongresestraro, laŭbezone sin pliigante. En la unua laborkunsido estu elektata kongresraportisto.

2. La kunvenoj de la kongreso estas publikaj, escepte se la kongreso formale decidas la malon.

3. Al voĉdono nur rajtas la kongresanoj, t. e. la aĉetintoj kongreskarton (Sm. 2.—), escepte en kunsido, kiu estas ĝenerala kunveno de I. K. U. E., en kiu nur rajtas voĉdoni la membroj de la internaciaj komitatoj. Vidu Statuton § VIII.

4. La nomoj de la kongresanoj estos enskribitaj de la kasto en alfabetan liston.

5. Por kontroli la nombron de ĉeestantoj voĉdonrajtigataj, la kongresanoj enskribos siajn nomojn ĉe la sekretario antaŭ la komenco de ĉiu kunveno.

6. En ĉiu sekvanta kunsido antaŭ la priparolado de iu temo aŭ propono estos voĉdono pri la skribita kaj legita raporto de la antaŭa kunsido.

7. La kongreso rajtas ŝanĝi laŭbezone la vicon de la traktotaĵoj, aŭ resendi ilin al sekvanta kongreso.

8. Neniu alia propono aŭ proponŝanĝo estos priparolata sen unuanima konsento de la estraro; voĉdono neniam okazos pri ĝi.

9. Dum la diskutado la oratoroj parolos laŭ la vico de sia enskribaĵo ĉe la Prezidanto de la kunsido. Iu, ne enskribita, ne parolu.

10. La paroladoj pri temoj kaj proponoj daŭru ne plu longe ol duonan horon. Pri la sama temo neniu parolu pli longe ol dekminute kaj unufoje. Tiu limigo ne koncernas la kongresestraranojn nek la paroladintojn.

11. Kiam ĉiuj enskribitoj por la diskutado estas havintaj sian vicon, la paroladinto povas dum 20 minutoj respondi.

12. Se la diskutado devas daŭrigi, la enskribitaj diskutintoj parolu ne pli ol 5 minutojn, la respondonta paroladinto ne pli ol 10 minutojn.

13. La voĉdono pri la deziresprimoj fariĝu per manlevado; fariĝu en provaĵo kaj kontraŭprovaĵo; laŭbezone la voĉoj estas laŭte kalkulataj de la prezidanto. La plimulto decidas; se la voĉoj estas egalnombraj, la prezidanto decidas.

14. En la lasta laborkunsido de kongreso oni voĉdonu pri la lando de la proksima kongreso, tiamaniere, ke el la du landoj, kiuj havos la plej multajn voĉojn, la Estraro de I.K.U.E. decidus post la kongreso.

§ IV. *Priaranĝoj postkongresaj.*

1. Tuj post la kongreso la Estraro de I.K.U.E. publikigos *Oficialan Raporton* pri la tuta kongreso en la proksima numero de E. K.

2. La Latine tradukitaj deziresprimoj estu sendataj de la Prezidanto al la Sankto Seĝo kaj al la Ĉef-episkopoj de ĉiuj landoj.

P-ro LAMB. POELL.

Tilburg (Nederlando).

Adresaro de Katolikaj Esperantistoj.

En nia lastjara Novembra numero estis enmetita cirkulero de nia ĝenerala sekretario pri Adresaro.

Ni petegas niajn legantojn, kiuj ne ankaraŭ respondis, tuj sendi la atenditajn sciigojn al P-ro Bianchini.

Tiu ĉi komunikis al ni, ke li ricevis kontentigajn informojn el kelkaj landoj (i. a. Hungarujo, Svisujo, Katalunujo), el aliaj landoj nur kelkajn, tre malmultajn el Belgujo kaj Nederlando.

Ni do denove instigas niajn amikojn, tuj kompletigi la mankantajn informojn kaj represigas ĉi sube la cirkuleron:

Samideanoj, Gefratoj,

Por nin plej facile reciproke koni kaj helpi, mi intencas eldoni kiel eble plej baldaŭ **Adresaron de Katolikaj Geesperantistoj** de la tuta mondo, kaj de almenaŭ unu fidinda hotelo en ĉiu urbo. — Pro tio mi insiste petas, ke oni min helpu kolekti kiel eble plej da respondoj al jenaj demandoj:

1. Nomo persona kaj familia.
2. Profesio.
3. Lando.
4. Ĉefurbo de via ĉirkaŭaĵo.
5. Via urbo.
6. Via strato kaj numero.

7. Kion vi povas fari por katolikoj vojaĝantaj aŭ petantaj informojn.

8. Kiaj estas ne karaj kaj tiel honestaj hoteloj de via urbo en kiuj povas kun trankvila koncienco loĝi katolikoj, pastroj, religiuloj. Aldonu ilian ĝustan adreson kaj se eble prezojn.

Atendante rapidajn, ĝustajn, konsciencajn informojn, Vin antaŭdankas.

Pastro JAKOBO BIANCHINI,
Ĝenerala Sekretario,
Fontanafredda (Udine)
(Italujo).

NIA V-a KONGRESO.

(Lastmomente ricevitaj informoj).

Ĉar okazis diskutadoj dum tiuj lastaj monatoj inter gravaj membroj de I.K.U.E. pri la dato kaj loko de „Nia Kvina“, E. K. ne povis ĝis nun paroli pri tiu temo.

Ĉiu nun interkonsentas, ke la V-a okazos en Lourdes, de la 12-a ĝis 17-a de Aŭgusto 1914.

S-ro Colas vizitos Lourdes post kelkaj tagoj por pristudi la organizadon kaj viziti la religiajn aŭtoritatojn. Nia venonta numero donos precizajn informojn pri Nia Kvina.

La kongreskarton (Prezo: 2 Sm.) oni povas de nun mendi de F-ino LARROCHE, 55 rue de Vaugirard, 55, Paris.

Enketo de „Espero Katolika“.

N-ro. 11. Respondo pri la Svislanda Katolika Ligo.

1. En Svislando ekzistas la „I. K. U. Svislanda Ligo“.
2. Ĝi okupas la svisan ŝtatteritorion.
3. Koncerne la fondiĝon: S-ro P-ro Richardson † interrilatis kun kelkaj Svisaj esperantistoj La 15-an de Junio 1913 okazis la prepara kunveno flanke de ĉirkaŭ 20 membroj en „Zug“ La oficiala fondiĝo okazis la 4-an de Aŭgusto 1913 okaze de la 4-a tutsvisa Katolika tago en St. Gallen.
4. Fondita la 4an de Aŭgusto 1913.
5. La Regularo estas regule aprobita.

6. Aprobo de la registaro ne estas necese laŭ niaj leĝoj.

7. Ne oficiale kaj direkte aprobita de la episkop(ar)o sed pere de la tutsvisa katolika asocio, al kiu nia ligo estas „alligita”.

8. Estas pastroj en nia ligo kiel religiaj konsilantoj, sed ili ne estas ankoraŭ oficiale elektitaj de la episkopo.

9. Fakestroj: 1. Katolika Esperanto-literaturo (kunprenita: la „Germana Katoliko” kaj la „Espero Katolika”: S-ro P-ro F. B. Strauchen, Kt. Lützel, Soloturn. — 2. Studentaro: S-ro A. Lang, stud Embach (Kt. Zürich) — 3. Lingvo: S-ro H. J. Unger, (Zürich) — 4. Junularo: S-ro P-ro Schönenberger, Rorschach. — 5. Ĝeneralaj gazetoj: S-ro D-ro Lehner, St. Gallen.

Plue, neoficialaj fakoj: Propagando ĉe la Pastraro: S-ro Flühler, seminario Schwyz; — propagando ĉe la seminarioj: S-ro Arnold, Seminario, Zug; — ekster-eŭropaj misionoj: S-ro Wohinger, Brunnenbergstr. 1, St. Gallen.

10. La kotizo estas frs. 3.— por la ordinaraĵoj membroj kaj frs. 5.— por la aliaj laŭ la regularo.

11. Hodiaŭ estas ĉirkaŭe 50 pagantaj membroj.

12. La Estraro estas: Prezidanto: Prof. Arnold, Seminario, Zug. — Vic-prezidanto: P-ro Prof. O. Flühler, Seminario, Schwyz. — Sekretario: D-ro Lehner, advokato, St. Gallen. — Kasisto: S-ro Hilfiker, Prof. Seminario Zug. — Kunsidanto: mankas.

13. Oficiala organo estas la „Germana katoliko”, kies apermanenteco jam konata al Vi per la germanaj katolikoj mem. Ni esperas, ke la proksiman jaron ni havos specialan folion en la „germana katoliko” kun titolo „svisa katoliko.”

14. Sino Milsom („Ramo”) en Genève tradukis „Fabiola”, — „En Svislando (kvin rakontoj)” — „Kredo kaj Scio” — „Dankon” — „Perfekta Kuiristino” — „Eĉ en doloro ni esta ĝojaj.” (Entute 6 libroj).

15. Rimarkindaĵoj: oficialaj interrilatoj kun la tutsvisa katolika asocio. Cetere diversaj internaj kaj ĉi tie hodiaŭ ne ankoraŭ publikindaĵoj.

16. Ĝi akceptis jam per la landligaj statutoj la ĝis-

nunan regularon de I. K. U. E. kaj deziras aliĝi oficiale al I. K. U. E.

La Sekretario:
D-ro LEHNER.

Kroniko de I. K. U. E.

(La publikigo de la tri unuesekvantaj artikoletoj bedaŭrinde devis esti prokrastata pro manko de spaco en la antaŭaj numeroj).

Kunvenoj de Katolikoj en Bern dum „La Naŭa”.

La 24-an de Aŭgusto okazis Sankta Meso en la preĝejo „Trinitatis”, dum kiu predikis pastro J. LAJOS el Hungarujo pri la junulo de Naĥm kaj nia mortinta patro abato RICHARDSON. La 25-an matene je la naŭa okazis la unua kun-sido en la universitato. Ĉeestis preskaŭ 40 personoj entute. La unua afero estis elekti prezidanton. Estis pastro BECKER el Bromberg, kiun oni elektis. Li diris kelkajn vortojn pri nia kara mortinto, demandante al ĉiuj preĝi por li. Poste oni pritraktis la aliĝon al I.K.U.E. kaj al ĝia oficiala gazeto E. K. Multaj el la ĉeestantoj ne sciis, ke ekzistas internacia unuiĝo de katolikaj geesperantistoj, kiu havas ĝian propran gazeton, kaj tiuj, kiuj sciis, ke I.K.U.E. ekzistas, ne konis la regularon, eĉ ne la estraron. Tial oni konkludis, ke estas necesege, ke oni propagandu en ĉiuj landoj nian I.K.U.E. kaj samtempe ĝian oficialan gazeton: E. K. Tuj komencante mi varbis naŭ abonantojn je E. K. Poste oni esprimis la deziron, ke ĉiuj unuiĝoj katolikaj esperantistaj estu devigataj, aboni la E. K. por la unuiĝo mem; oni instigu la anojn, fari la samon ĉiuj aparte. La katolikoj, kiuj estas membroj de neŭtralaj unuiĝoj, devigu la estraron aboni la katolikan gazeton por la katolikaj membroj. — Ĉiuj estis petataj ĉeesti la funebran Meson por abato RICHARDSON, kiu okazus la 26-an. Pastro J. LAJOS diris tiun Meson kaj post la diservo ni kunvenis en salono apud la preĝejo, kie nia amiko S-ro COLAS rakontis al ni

la foriron de nia kara patro al la ĉielo. La 27-an matene ni denove kunvenis por priparoli precipe la iro al kaj la ĉeesto de „Nia Kvara” en Romo.

Rememorante la konkludojn de nia unua kunsido dum ĉi tiu kongreso, pastro BECKER malfermis la kunvenon. Li ĝojis, ke S-ro COLAS alvenis kaj demandis lin, ĉu li volu akcepti la prezidantecon de ĉi tiu kunsido. La kaŭzo, kial S-ro COLAS ne ĉeestis nian unuan kunvenon, estis la morto de nia kara abato RICHARDSON. Poste sciigis S-ro Colas nin ĉion, kion li ĝis nun faris kaj scias pri nia kvara kongreso en Romo. La tagordo ne estis ankoraŭ fiksita, sed S-ro Colas forvojaĝos post nia kunveno al Romo por prizorgi ĉion rilate la kongreson. Al tiuj, kiuj intencis viziti antaŭ Romo la Milanan kongreson, li donis la konsilon sin turni al pastro BECKER, kiu interrilatos pri tiu vizito kun S-ro CATTORINI en Milano. Pri la rabato por la vagonaro estas necese, ke ni estu kun sufiĉe granda karavano. La plej bone estas, ke ni prenu simplan biljeton ĝis Milano kaj tien ni ricevos la rabatilojn por la vojaĝo al Romo. Ankaŭ por tiu vojaĝo zorgos pastro BECKER. Tiuj, kiuj ne intencas partopreni al ĉiuj okazintaĵoj aranĝitaj de la kongresa komitato povas tamen partopreni al tiuj, kiujn ili deziras. Post la fermo de nia kunveno S-ro Colas donis okazon al la ĉeestantoj, aliĝi al nia kongreso.

La 30-an ni denove kunvenis je la kvina kaj kvarono posttagmeze. De ĉi tiu kunveno mi nur rememoras, ke ni priparolis la forvojaĝon al Milano kaj Romo; ĝi ne estis kunveno, nur familia rondo por priparoli komunan vojaĝon.

Unu el la ĉeestintoj,
F-ino VAN AMELSFORT.

ANTAŬKONGRESO EN MILANO

2 Septembro 1913.

Forirante al Romo, la redaktoro de E.K. vojaĝis rekte de Nederlando al *Milano*; al mi donis grandan ĝojon la penso, ke mi tie rekontos P-ron BIANCHINI, la fervora kunlabor-

anto de E. K., la senlaca propagandisto en Italujo, kiu atingis jam tiom da praktikaj kaj efektivaj rezultoj por nia movado. Sed anstataŭ li, bonvenigis min ĉe la Milana stacidomo P-ro BECKER el Germanujo, kiun mi jam konis kiel kongresano de „Nia Dua” en Hago: li estas unu el la plej simpatiaj kaj gravaj Pastroj-samcelanoj. Tiu ĉi baldaŭ komprenigis min, ke oni atendas min en la tuj komenconta propaganda kunveno; kaj mi, lacigita pro la longa vojaĝo kaj la Itala varmego, anstataŭ ripozi kaj refreŝiĝi tamen volonte konsentis iri al la kunveno, eĉ feliĉa, ke mi povis fari plezuron ĉal nia fervorega P-ro BIANCHINI.

Tuj post mia alveno la kunveno estis malfermita de S-ro CATTORINI, kiu donis la parolon al P-ro BIANCHINI, kiu elokvente esprimis sian ĝojon kaj dankon al la ĉeestantoj kaj sian esperon pri baldaŭa sukceso de Esperanto inter la Italaj Katolikoj. Poste fremdlandaj Esperantistoj salutis la kunvenantaron; iliaj vortoj estis tradukitaj de P-ro BIANCHINI. Tiu ĉi legis aprobajn leterojn de la kardinalo FERRARI de Milano, de la Episkopoj de Pavia kaj de Tortona k.t.p.

Poste paroladis en itala lingvo P-ro BIANCHINI pri „Pastraro, Esperanto kaj Elmigrado”; P-ro CAROLFI pri „Esperanto en la Seminarioj” kaj P-ro SPADA pri: „l’ Esperanto kaj la Misioj.”

Estas nedubeble, ke la kunveno faris grandan impreson sur la ĉeestintaj neesperantistoj, inter kiuj multaj pastroj, kaj ke ĝi multe antaŭenpuŝos nian movadon en Norda Italujo, de kie ĝi disvastiĝu tra tuta Italujo.

P-ro BIANCHINI ankaŭ eldonas duonmonatan gazeton: „*l’Esperanto*”, kiun ni tre rekomendas al niaj legantoj (adreso: S. Vito al Tagliamento (Veneto), Italia; — vidu la anoncon sur la kovrilo. Ĝi donas lecionojn pri la Itala lingvo per Esperanto, kaj lecionojn pri la Itala elparolo de la latina lingvo, kies elparolado uniformeca tra la tuta mondo, tiel estas dezirata de Papo Pio X. — Kiel aldonon ĝi plue donas belan tradukon de la Itala verko.

Mi sciiĝis post la kunveno, ke la saman tagon matene la

Esperantistoj havis meson kaj benon kun la plej Sankta Sakramento en la bela preĝejo de S. Fidele. Celebris la kanoniko Mons. INSOLI.

D-ro SMULDERS.

NIA KVARA.

Raporto ¹⁾ pri la Malferma Kunsido.

S-ro COLAS anoncas la malfermon de la kunsido kaj transmetas la prezidantecon al S-ro Pastro PARKER. (Aplaŭdo).

S-ro Pastro PARKER respondas danke kaj parolas pri la eks-prezidanto mortinta: Ĉiam helpema, bona, li estis *homo*. Li estis nia gloro kaj forto: Ripozu nia amiko.

S-ro PARKER demandas la kunlaboradon de ĉiuj: Varbo de anoj, abonigo al Espero Katolika, ĝenerala antaŭenpuŝo de la afero. Li alvokas la preĝojn de la mortinta P-tro RICHARDSON, por ke prosperu la movado. (Aplaŭdo)

S-ro PARKER donas parolon al S-ro COLAS.

S-ro COLAS esprimas sian emocion je la malfermo de tiu gravega kongreso en la Eterna Urbo. Li salutas respektplene kaj ameme la Eternan Urbon: la Papon unue, por kiu la katolikaj esperantistoj estas obeemaj kaj tute submetitaj filoj; la Urbon, kun ĉiuj ĝiaj memoroj, kun ĉiuj ĝiaj gloraĵoj. Poste, resumante la jam faritan laboron kaj la kongresojn antaŭajn, li difinas, laŭ deziro formale esprimita kelkajn tagojn antaŭe de Patro RICHARDSON mem, la celon de la movado: Servigi Esperanton je la gloro de Dio kaj la triumfo de la Eklezio, unuigi ĉiujn katolikojn diversnaciajn, por labori je la komuna bono, kaj por esti fortaj en la estontaj bataloj; altiri al la Vero integrala la disiĝantojn. Por ni Esperanto estas *rimedo*, ne celo; *lingvo*, ne doktrino. Finante, li dankas al ĉiuj, kiuj, en Romo, montris intereson por nia kongreso: *L'Associazione Flaminia*, la *katolikan Junularon de Italuj*! kiu sendis sian ĝeneralan sekretarion, kaj la asociojn de Romo, kiuj delegis al la kongreso S-ron Tupini.

¹⁾ Tiun ĉi raporton la redakcio ankoraŭ ricevis de S-ro Colas. Ĝi estas farita dumkunsido de unu el la ĉeestintoj.

S-ro COLAS dankas la helpantojn: la Flaminian Societon, S-ron Farelli'n kaj la prezidanton S-ron Pericoli.

S-ro (Sekretario) parolas itale kaj faras resumon de la vivo de S-ro P-ro Richardson, kaj en lia nomo salutas kore la Sanktan Patron, la helpantojn kaj precipe la junularon katolikan en Romo.

Prezidanto ke la Katolika Junularo de Romo (Itale)

Riprezentanto de la alportas la saluton entuziasman de la Roma Katolikaro (kat. societoj) al Esperanto, kiu kunigos la popolojn en la kristana fido.

Telegramoj: S-ro Lammers, Germanujo.

S-ro Severijns, Nederlando.

S-ro ? Nurenburg.

S-ro Antonotto, Aŭstrio.

S-ro Corbignano Meijer, Bavarujo.

S-ro Codorniu, Hispanujo.

S-ro *Dombrowski, Kovno (Ruslando)*

Riprezentantoj:

Anglujo: S-ro Hookaw. Salutas je la nomo de Anglaj Katolikoj.

Belgujo: S-ro Van Schoor. Malĝojas pri la morto de S-ro P-ro Richardson kaj deziras bonan sukceson kaj kreskadon al la Esp. Katolika movado.

S-ro Ulm: Granda graveco de Esperanto precipe por Aŭstrio pro la multlingveco de la lando. Malfeliĉe Esperantismo estas suspektata ĉe la pastraro en Aŭstrio pro la Izraelitaj komencoj de la movado. *Espero Katolika* estas do tre necesa. S-ro Ulm alportas saluton de la Aŭstrianoj.

Alportas la Bavarajn salutojn kaj bondezirojn por la sukceso de la movado.

S-ino R. Junk, pro Bohemujo, alportas mallongan saluton por la Bohemo kaj el Liguroj, kaj de la prezidanto de la societo de Bordigheza: S-ro Bicknell, kies versaĵon ŝi legas.

Francujo: F-ino Couvin. Salutas.

„ kaj Ruĝa Kruco: S-ro Antonio. Montras la necesecon de interkompreniĝo inter la kuracistoj kaj flegistoj de la vunditoj.

Germanujo: S-ro (P-ro) Becker. Diras, ke dika nebulo

de malkompreniĝo, malpaco, kaj malfido kovras la teron kaj deziras, ke la suno de la fido dispelu la nubojn.

Por Irlando, la Prezidanto, S-ro Parker.

Por Italujo: P-ro frat. Carolfi, O.F.M. Deziras, ke la paco, donita al la Eklezio per la imperiestro, disvastiĝu per la Eklezio en la mondo.

Por Katalunujo: P-ro Planas. Je la nomo de la Episkopo de Barcelono alportas benon kaj saluton, kaj saluton de la Esperantistaj infanoj, kaj de la revuoj, kaj je la nomo de ĉiuj katalunaj pastroj, kaj demandas preĝojn por P-ro Richardson.

S-ro Colas alportas 2 aliajn episkopajn benojn, de Niceo kaj de Pontegruaro.

S-ro Smulders: Nederlando. Parolas pri la Pacpalaco kaj pri la vaneco de ia pacprovo aparte de la kristana religio. Parolas ankaŭ pri la laboro de P-ro Richardson kaj adresas al li dankon.

S-ro D-ro Lehner: Svislando. Parolas pri la katolika klopodo en Svislando.

Je la nomo de la Blinduloj: letero, legita de S-ino Larroche.

Adreso de Telegramo al lia Papa Moŝto.

Leteroj afablaj de Italaj Episkopoj estas legataj.

P-ro Parker fermas la kunsidon.

AUSTRIA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA.

Oficiala Raporto de la unua Jarkunveno.

La „Austria Katolika Ligo Esperantista,, (A.K.L.E..) havis dum la 9 a de Novembro 1913a sian unuan jarkunvenon. Fondita dum la tagoj de la 23a Eŭkaristia Mondkongreso en la 1912a en Wien, sub la auspicioj de nia neniam forgesota Pastro Richardson, kiu kun grava ĝojo aŭdis pri tiu fondo dum la malmultaj tagoj de sia restado en la Aŭstria ĉefurbo post la kongrestagoj de Budapeŝt, tiu Ligo de katolikaj esperantistoj en la tuta imperio kreskis iom post iom, kvankam tute ne subtenata de la katolika pastraro kaj akiris anojn en ĉiuj provincoj. Certe ĉiuj la multaj

necesaj laboroj ja ŝargis la ŝultrojn de nur kelke da fervoraj estraranoj en Wien preskaŭ ĝis laciĝo, sed la sukcesoj de tiuj laboroj tamen refreŝigis la fortojn kaj kun prava fiero pro la kontentiga rezulto spite ĉiuj malfavoraĵoj kaj malfacilaĵoj la estraro de la Ligo povis prepari la unuan ĝeneralan kunvenon. Ĝi havis lokon en salono de la pedagogia instituto de la provinco Malsupra Aŭstrio en Wien kaj estis tre bone vizitita de Liganoj kaj de personoj, kiuj interesiĝas pri la Esperanto-movado en la katolikaro de Aŭstrio.

Antaŭ la kunveno okazis en la preĝejo de Deutscher Ritterorden (ordeno de germanaj kavaliroj) la unua komplementa Diservo kun Esperanto en Wien. Dum la Eŭkaristia Kongreso la prelato Giesswein el Budapeŝt ja predikis iuvespere en la kriptoj de la Canisius-preĝejo en Wien per Esperanto pri la Eŭkaristio, kaj ankaŭ la litanio de de ĉiuj sanktuloj tiam estis dirita en nia kara lingvo, sed sankta meso kun prediko, kantoj kaj postmesaj preĝoj en Esperanto ĝis la 9a de Novembro 1913a ne estis dirata en la ĉefurbo de Aŭstrio. Feliĉe la Ligo akiris tre fervoran anon kaj veran apostolon de nia sankta afero en la persono de la profesoro pri religio S-ro Rudolfo Questel, kiu nur dum Junio de la 1913a estis komencinta lerni nian karan lingvon kaj post tiom da mallonga tempo ĝin jam posedis en tiu grado, ke li mem povis verki kaj diri predikon, kies enhavo kortuŝis ĉiujn aŭskultantojn. Li nome diris post la evangelio de la meso jenon:

„Karegaj aŭskultantoj! Ni legas en la Sankta Skribo, ke komence de la homara historio nur unu lingvo ekzistis. „Estis sur la tero nur unu lingvo kaj unuspeca parolo,” skribis Mojzo en la II-a ĉapitro de Genezo. Sed tiu belega harmonio ne daŭris longe. La sama sankta verkisto plue raportas: „Kiam la homoj intencis konstrui turon, kies pinto devis atingi ĉielon, la Ĉiopova diris: „Ni do mal-supreniru kaj konfuzu ilian lingvon, por ke ne komprenu unu la lingvon de alia.” Tiamaniere la komenca harmonio inter Dio kaj la homoj unuflanke kaj inter la homoj alia-

flanke estis detruita. La homoj fiere disiĝis de Dio, tial ankaŭ Dio, disigis la homojn, konfuzante ilian lingvon.

„Pasis kelkaj miljaroj. La homaro estis ekkoninta, ke estas neeble, vivi sen Dio. Pro tio la homoj komencis sopiri je Dio, ili alvokis Lin, kaj Dio plenumis ilian peton; Li sendis Sian filon teren, por repacigi la homojn kun Dio kaj unuigi ilin inter si. La amo al Dio revenis en la homajn korojn kaj kun la amo la origina harmonio. Foje la fiero estis disiginta la homojn, nun la amo proksimigis ilin reciproke. Dum la unua kristana Pentekosto en Jeruzalemo la Dia Spirito ree malsupreniris el ĉielo teren, sed ne, kiel antaŭ miljaroj, por disirigi la homojn, Li venis, por unuigi ilin. Kaj jen, kiel antaŭe la lingvo estis la ilo por konfuzi la homaron, tiel nun la lingvo fariĝis la ilo por kunigi ĝin. La Historio de la Apostoloj sciigas pri tiu fakto: „Kiam la bruo fariĝis, la amaso kunvenis kaj estis konsternita, ĉar ĉiu aŭdis ilin parolantaj sian propran lingvon.” Ĉu tiu sceno ne estas kapabla, emociegi niajn korojn? Ni ankaŭ klopodas, per tiu ĉi unu lingvo, kiun ni parolas, restarigi la originan harmonion, restarigi la veran homan amon. Ni katolikaj kristanoj certe ne povas senatente preteriri tiun fakton, ni ja apartenas al tiu granda societo, pri kiu ĝia Dia fondinto diris: „Estos unu ŝafejo kaj unu paŝtisto.” Tial ĉiu katoliko ĝoje salutu la Esperanto-movadon, ĉar ĝi estas ilo treege konvena por unuigi la tutan homaron kaj ĉiujn homojn ame unuigitajn konduki al la Dia paŝtisto.

„La kristana religio estas la religio de amo, sed la vera kristanismo nomiĝas katolika t. e. universala, tial ke ĝi enhavas en si la forton ampleksi ĉiujn homojn el ĉiuj tempoj kaj lokoj. Tiu forteco de l'kristanismo estas fondita en la vortoj de l'Dia Sinjoro: „Iru kaj instru ĉiujn popolojn.” Kiam Jezuo diris tiujn vortojn, la apostoloj povis pli facile instrui la popolojn ol iliaj hodiaŭaj posteuloj. Tiutempe en la vasta Roma imperio nur du gravaj lingvoj ekzistis: la kleraj gevioj parolis greke, la ordinara popolo latine. La homoj tiutempe do estis pli proksime al si ol niatemp, ĉar tiam mankis la malfacileco por interkom-

preniĝi. Tial ni komprenas, kial la kristanismo dum relative mallonga tempo tiel rapide kaj tiel grandspace disvastiĝis. Kiam Konstateno, la granda Roma inperiestro, dum la 313a per la Milana edikto donis liberecon al la kristanismo, ĝi jam estis sin etendinta sur la tuta tiutempe konata mondo. Dum la nuna jaro ni ja festas la mil sescent jaran datrevenon de tiu grandioza okazintaĵo. Nia Sankta Patro deziregas, ke ĉiu kristano partoprenu en tiu glora venko de kristaneeco. Per aludo je tiu grandega okazintaĵo li volas kvazaŭ montri al ni, ke la kristanismo nur tiam sukcesos kaj venkos la malamikajn atakojn kontraŭ ĝi, kiam ĉiuj kristanoj estos kunigitaj per amo al Dio. Kaj, se iu demandus nin: Kio niateme disirigas la homojn? ni estus devigataj respondi: Tio estas la bedaŭrindaj bataloj inter nacioj, precipe en nia patrujo. Ni nur ĉirkaŭrigardu kaj ni certiĝos, ke tio estas vero. Certe, la bataloj inter nacioj disigas la loĝantaron de nia karega patrujo kaj elŝiras la amon el la homaj koroj.

„Kaj kial ĉio tio? Tial, ke ili ne povas interkompreniĝi. Se unu komuna helpa lingvo kunigus la diversajn naciojn, la bataloj ĉesus, ĉar tiamaniere malaperus la ĵaluzo, la ĉefa kaŭzo de nacia malamikeco. Ĉu nia Dia Sinjoro Jezuo ne diris: Per tio oni ekkonos, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi amas unu la alian?”

„Ni do helpu realigi tiujn vortojn de nia Sinjoro, ni forigu a barilon kontraŭ amo, ni fortege pledu por la sankta afero de lingvo internacia. Certe ne estos eble al ni, gajni la tutan homaron por nia glorega ideo, certe ĉiam, troviĝos malamikoj. Sed tio ne devas senkuraĝigi nin. La malbono neniam tute malaperos el tiu ĉi mondo. Sed nia Dia Sinjoro instruas nin per la parabolo pri lolo kaj tritiko, ke la bono fine tamen venkos la malbonon.

„Ĉiu venko postulas grandan penadon. Ni do senlace klopodu por nia sankta afero, ankaŭ se ni ne tuj sukcesos. Ne ĉiu, kiu pledis por iu idealo, por iu granda afero, spertis mem la sukceson de siaj klopodoj. Memoru pri Mojzo, la fama gvidanto de la Izraelida popolo! Dum kvardek jaroj li gvidis tiun popolon, multe penante kaj suferante. Fine li

jam estis atinginta la limojn de l'sankta promesita lando, sed eniri ĝin li ne rajtis. Li mortis, antaŭ ol la Izraelidoj eniris la sanktan landon. Li estis penege laborinta, sed la fruktojn de liaj klopodoj rikoltis aliaj.

„Ni pripensu tiun lakton, se ankaŭ nia penado ŝajnas resti sensukcesa. Dio certe rekompencos nian bonan voladon, kaj niaj posteuloj rikoltos la fruktojn, kies semerojn ni semis. Amen.”

La partoj de la meso estis akompanataj de bela kaj bona kantado de „Ni volas Dion” kaj „Ave Maria.” Ĉarmaj junulinoj gvidataj de la fervora vicprezidentino de la Ligo kantis, kaj la ceteraj ĉeestantoj, kiuj plenigis la preĝejon kaj estis ricevintaj presitajn tekstojn de la necesaj preĝoj kaj kantoj, kunkantis pieme kaj ĝojigite, aŭdis la belsonajn vortojn de nia kara lingvo uzataj por la laŭdo de Dio ankaŭ en Wien. Ankaŭ la preĝoj post la meso estis kunpreĝataj de la ĉeestantaro kaj „Te Deum” en Esperanto finis solene tiun impresplenan Diservon.

La partoprenintoj tiam kune marŝis al la kunvenejo, kiun ili plenigis ĝis ĝia lasta loko. La prezidanto de la Ligo, S-ro Schröder, malfermis la kunsidon per kelkaj vortoj de saluto, kaj la himno „Esperanto” tiam de ĉiuj Liganoj entuziasme estis kantita. La prezidanto momorigis tiam pri la grava perdo por nia afero per la morto de pastro Austin Richardson, kaj dum liaj vortoj ĉiuj ĉeestantoj ekstaris, por honori la memoron je tiu ne facile anstataŭota apostolo de Esperanto inter katolikoj.

La prezidanto nun klarigis en germana lingvo la utilojn, konatiĝi kun Esperanio, ankaŭ por katolikoj, li montris la diversajn jam nuntempe eblajn okazojn, uzadi nian lingvon por katolikaj celoj, kaj alvokis la helpon kaj subtenon de la pastraro en Aŭstrio por la Ligo.

La protokolisto de la Ligo S-ro instruisto Hörl tiam raportis pri la laboroj kaj la sukcesoj dum la unua jaro de ekzisto de la Ligo. La estraro de nia Ligo havis 12 kunsidoj. Oni eldonis flugfoliojn 5000. Kursoj okazis en diversaj distriktoj de Wien en la ĉirkaŭaĵo en Tulln, Nikols-

burg Wels. En kelkaj katolikaj unuiĝoj, 3 en Katolikaj submajstraj unuiĝoj, en junularo kaj unuiĝo de katolika junularo de Aŭstrio.

Nia ligo sendis delegiton al la IV-a Kat. Kongreso en Romo kiu raportos poste en Esperanto.

La Ligo havas isolitajn membrojn en ĉiuj Kronlandoj inter 8 diversaj nacioj. En Eger (Bohemio) estas fondota Katolika grupo. Eger estas kuŝanta apud Franzensbad (kuracejo-banloko), kie okazos la IVa tutaŭstria kongreso.

La gazetaro, kiu antaŭe aperigis kontraŭajn artikolojn nun estas gajnita kaj aperigas niajn okazantaĵojn. Precipe la „Reichspost“ „Weltblatt“ „Sonntagsglocke“ „Egerland“ „Welser Zeitung“.

Poste li, la kasisto de la Ligo, S-ro instruisto Kellner, informis pri la spezoj kaj pri la fina stato de monrimedoj por la Ligo. Ambaŭ raportoj kontentigis kaj vekis esperojn pri daŭra progresado.

La voĉdono pri la nova estraro donis al A.K.L.E. jenan gvidantaron por la nova jaro de efikado: S-ro kortega konsilanto Jungwirth prezidanto, S-ro redaktoro Schröder, S-ino de Kubin kaj S-ro Ulm de „Verda Stelo“ vicprezidantoj, S-roj instruisto Hörl kaj revidento Pavelka protokolitoj, S-roj instruisto Kellner kaj revidento Kühnel kasistoj, S-roj König kaj Rohleder (Sekretario de „Verda Stelo“) revizoroj, S-ro Questel konsilanto pri religiaj aferoj, S-roj. subkolonelo Schubert, direktoro de duagrada popol-lernejo Schamanek, sekretario Aigner, Po. Koller (monaĥejo Göttweig) por monaĥejaj aferoj, S-ro Gebauer por la provinco Bohemio, komercisto Wesely por la provinco Moravio, stud. fil. Kabelka por la provinco Stirio, Martisehnig por la provinco Karintio kunsidantoj.

La nova prezidanto, elektita kiel la ceteraj estraranoj aklame ĉiuvoĉe, estis salutita per entuziasma aplaŭdo. Li dankis por la elekto, promesis kunlabori por la celoj de la Ligo laŭ siaj povoj kaj dankis al la antaŭa estraro por la bono laboro. Li montris per kelkaj vortoj siajn planojn kaj petis subtenon de ĉiuj estraranoj kaj Liganoj en sia laboro.

S-ro Pavelka legis poeziaĵon de li verkitan pri nia kara lingvo kaj ricevis laŭmeritan aplaŭdon. Tiam S-ro, Ulm, la delegito de la Ligo en la Roma kongreso katolika, raportis per Esperanto-lingvo flue kaj lerte pri la spertoj dum la vojaĝo kaj la kongrestagoj en la eterna urbo. Ankaŭ liaj vortoj estis aplaŭditaj pro ilia intereso.

Bela fino de tiu solena kunsido estis la kantado de bone konataj germanaj popolaj kantoj Esperante tradukitaj, nome: La tilio, La gaja migranto, Adiaŭo kaj Sankta Lucio. La junulinoj, kiuj jam la Diservon beligis per sia kantado, kantis ankaŭ tiujn kantetojn tre ĉarme, akompanataj per pianoforto de S-ro Orel, kiu ankaŭ la himnon dankinde estis akompaninta. S-ino de Kubin lerte gvidis la junajn kantantinojn, kiuj per forta aplaŭdo estis rekompencitaj kune kun ilia direktintino. Samtempe oni vendis la poŝtkartojn kun la interno de la preĝejo, per kio iu samideano la ĉeestantojn surprizis.

Per kelkaj favoraj vortoj la nova prezidanto fermis la gravan kunsidon, kiu tre bone impresis ĉiujn ĉeestantojn. Oni do povas esperi, ke la dua jaro de A.K.L.E. daŭrigos la ĝisnunajn sukcesojn por la beno de nia afero kaj de la katolikoj en Aŭstrio.

La kotizo ($1\frac{1}{2}$ Sm. = K. 1,20) restis la sama, ankaŭ la oficiala organo de la Ligo, „Espero Katolika”; sed novaj tre belaj signoj (kvinpinta verda stelo kun blanka disko en la mezo, sur kiu ora kruceto estas videbla), fabrikitaj por tre malkara prezo de Aŭstria firmo en du grandoj, estis akceptitaj oficiale. La granda pinglo kostas 50 h. = 21 sd., la malgranda 40 h. = 17 sd. Kunvenejo de nun ĉiulunde en Restaŭracio Wien II Capistrangasse 12.

La estraro de A.K.L.E. en Wien.

A. JUNGWIRTH, prezidanto.

BENITO ULM, vic-prezedanto.

PAWELKA, dua sekretario.

LA OKTAVO DE PREĜADO.

Tre estimata Redaktoro,

Ankoraŭ unu fojon mi petas permeson inviti viajn legantojn partopreni je la Oktavo de Preĝado por la Reunuiĝo de la tuta Kristanaro, aranĝita de la Redaktoro de la Usona Gazeto „The Lamp”. Ĝi estas aprobita de lia Papa Moŝto kaj de ĉiuj Usonaj Kardinaloj. La sekvanta aranĝo de la intencoj eble estos utila al la partoprenantoj.

Jan. 18. La reveno de ĉiuj aliaj ŝafoj al la unu ŝafejo.

Jan. 19. La reveno pe ĉiuj Orientaj Disiĝuloj al la unuiĝo kun la Petra Seĝo.

Jan. 20. La submetiĝo de ĉiuj Anglikanoj al la aŭtoritato de la Vikario de Kristo.

Jan. 21. La reveno de la Luteranoj, Kalvinanoj, kaj aliaj Kontinentaj Protestantoj al la Eklezio.

Jan. 22. La unuiĝo de ĉiuj Amerikanaj Kristanoj per reunuiĝo kun la Petra Seĝo.

Jan. 23. La reveno al la Sakramentoj de ĉiuj nefarantaj Katolikoj.

Jan. 24. La konvertiĝo de la Judeoj.

Jan. 25. La misia venko de la tuta mondo por Kristo.

Kun alta respekto, mi restas,

via sindoneme

Croftside. Dorking (Anglujo).

A. H. NANKIVEL.

23 Decembro 1913.

Bibliografio.¹⁾

1. *Tacoma*. — angla teksto kun esperanta aldono; grandformata, 35 paĝa, kun multnombra kolorita bildaro.

¹⁾ Noto de la redakcio. — Ni intencas denove doni recenzojn pri aperintaj Esp. libroj. P-ro Linnebank akceptis la taskon de recenzisto, por kio ni kore dankas.

La recenzotajn librojn oni sendu po du ekzempleroj al la redakcio de E. K,

1913. La „*Tacoma Commercial Club*” en Washington’a ŝtato publikigis libreton pri tiu-ĉi urbo de okcidenta Usono. Ĝi havas 100.000 da loĝantoj. Belaj domoj, imponantaj konstruaĵoj, mirinda haveno, ideala klimato allogas la energion kaj la luksemecon de l’ tuta mondo.

La „*Tacoma Commercial Club*” jam antaŭ kelkaj jaroj komencis uzi Esperanton por reklamadaj celoj kaj — laŭ ĝia spontana deklaro — *la rezultato estis tre bona*.

2. *Los Angeles*. — *Kalifornio* — *la urbo kaj la graflando*. Eldonita de *Komerca Ĉambro* tiea. 1912. 55 paĝa; ilustr. Ĉarmanta priskribado de tiu-ĉi paradizo. Personoj dezirantaj ensendi tien siajn kapitalojn aŭ sin mem, obtenas ĉiajn informojn rilate al klimato, industrio, kostoj de vivado, sociaj cirkonstancoj k. t. p.

3. *Gvidlibreto por Haarlem kaj ĉirkaŭaĵoj*. 1913. Jen produkto de progresema Nederlanda klubo! Kresku kaj floru ĝi!

La esperanta klubo „*Komprenado faras pacon*” prizorgis tiun-ĉi kompletan gvidlibron por ĝia fama loĝadeja urbo. Krom trapromenado, Harlema plano, esperant-adresoj, nomoj de rekomenditaj hoteloj, restoracioj, lakt-salonoj, preĝejoj, troviĝas, malmultvorte, ĉio, kion bonega gvidisto devas elmontri.

4. *Nova biblioteko Esperanto*. N-ro 1. eldonita de *J. Glück kaj D-ro Sös*.

Poeziaĵoj de Frederiko Schiller, tradukitaj de kolonelo *Zwach*. Prezo Sm. 0.250 (kr. 0.60). *Wien, Paul Knepler Bauernmarkt 15*. 30 paĝa. La enhavo promesas 4 pecojn:

La kanto pri la sonorilo. — (Das lied von der Glocke.) *La gruoj de Ibikuso*. (Die Kraniche des Ibykus.) *La ringo de Polikrateso*. (Der Ring des Polykrates.), estas la principaj. Pri la du lastaj poeziaĵoj diris pastro Baumgartner (Weltliteratur, Ergänzungsband p. 373-383) „ŝatindegaj legendoj de l’ antikva tempo”. „Das Lied von der Glocke” li karakterizis, „sonorilas, tra la Germanlando, kiel melodio, el la pleja profundeco kaj intimeco de l’ popolo elfluinta, kaj resonoras en milionoj da koroj.”

Jen la unua strofo;

Fest gemauert in der Erden
 Steht die Form aus Lehm gebrannt.
 Heute musz die Glocke werden!
 Frisch, Gesellen, seid zur Hand!
 Von der Stirne heisz
 Rinnen musz der Schweitz,
 Soll das Werk den Meister loben;
 Doch der Segen kommt von oben.

Esp.: Fikse en la ter' metita
 Staras formo el argil',
 Jen hodiaŭ finfarita
 Devas esti sonoril'!
 Nur de l' frunto ŝvit'
 Estas la merit',
 Se la majstro laŭdon prenas;
 Sed la ben' de supre venas.

5. *S. Tijunaitis, Tarptantinė kalba Esperanto, Vadovėlis Lietuviams.* — 1 rub. Redagavo ir prakalba pridėjo — *kun A. Dambranskas, Lankaicio ir B.-ves spanstuvė Seinai. 1912.*

Komence mi ne sciis kian lingvon miaj okuloj ekvidetas. Nun, mi scias: estas litova-esperanta gramatiko (208 paĝa) kies aŭtoro estas profesoro, fama profesoro pastro Dombrovski.

La apero de tiaj verkoj konfirmadas nian konvinkon, ke Esperanto kunligos la orientan kaj la okcidentan mondon.

Uden. (Nederlando.)

H. LINNEBANK.

Io pri socialagado katolika.

Ptro. G. Palau, jezuito, de kelkaj jaroj disvastigas la katolikan socialagadon en nia lando. Li, eminenta kompetentulo en tiaj aferoj senĉese laboras. Li ja iĝis la patro de l' laboristaro en Barcelono... en la tuta lando. La Katolika socialagado disvastiĝis majeste en nia lando dank' al lia laborado kaj al la kunhelpo de kelkaj influaj kaj altrangaj personoj. La 5-an de aprilo de l' 1913-a estis

dato memorinda por la socialagado en nia lando, kaj eble la plej ĝoja tago por P-ro Palaŭ; en ĝi li vidis preskaŭ plenumitaj siajn laŭdindajn dezirojn Granda propagando en la lokaj ĵurnaloj sciigas, ke en tiu tago okazas la solena inaŭguracio de la *Casal Popular* (Popola domo) aŭ pli bone kiel diris iu, *Papola Palaco*. Kio estas la *Casal Popular*? Ĝi estas simple nesto de la *Popola Socialagado Katolika* en nia lando. Majstre nia kara episkopa Moŝto D-ro J. Laguarda en sia elokventa ferma parolado diris: „Je la komenco, mi juĝis tiun agadon kiel celo de iu romantikulo aŭ frenezulo; tamen mi patre sekvis la farojn kaj nun mi solene devas konstatigi ke la agado de la *Acción Social Popular* estas efika ilo kreita por atingi nedubeblan certan rezultaton ĉe la direktantaj klasoj de la societo kaj ĉe la laboristoj”. Multnombraj riprezentantoj ĉeestis al tiu granda festo, kaj speciale ni devas citi tiun de nia *Katolika Ligo* S-ro J. Sabaté P-ro nia kara sekretario. La festo bone sukcesis; ni povis ĝui kelkajn horojn aŭskultante belajn paroladojn de kompetentuloj en la socialdemando; ni povis ekscii pri diversaj celoj kiujn disvolvigos la laborema societo; ni povis akiri konvinkon de efikaj rezultatoj laŭ la bone organizitaj iloj en tiu fabrikejo de popola feliĉo.

Bedaŭrinde pro ne sufiĉa spaco mi ne povas pli raporti hodiaŭ pri tio, sed mi intertempe informos al niaj karaj gelegantoj pri tiu institucio. Dume ni konstatu la profitan kreskon de la katolika socialagado en nia lando.

D-ro JOAQUIM COLL P-RO.

(*El Kataluna Katoliko.*)

Festo de Katolika Korporacio.

La Katolika Unuiĝo Fervoja de Francujo, kiu nun kalkulas 55.000 membrojn, donis sian jaran feston la dimanĉon 10 Aŭgusto, en Parizo.

Dum la nokto okazis ĉe la baziliko de Sankta Koro de Jezuo solena adorado rezervita por la katolikaj fervojistoj. Ĉeestis pli ol 6.000, Noktmeze S-ro Kanoniko Tournier de

Reims faris Sanktan Meson kaj S-ro Kanoniko Reyman, ĝenerala direktoro de la Unuiĝo predikis.

Dimanĉon matene, je la 7-a okazis la studa kunveno, ĉe ĉambrego proksima de la Baziliko. Je la 9-a Fervojistoj ĉeestis kantatan meson. Monsinjoro Odelin, ĉefa Vikario de Parizo, predikis. En la ĥorejo staris . . . standardoj de la Katolika Unuiĝo Fervoja. Multkortuŝanta vido!

Tagmeze, korporacia festeno kun la prezido de S-ro Grafo Matheus, honora prezidanto de la Unuiĝo.

Je la 4-a ĉe la Baziliko-Katedralo de N.-S. okazis la ĉefa ceremonio. L. E. Kardinalo Amette, ĉefepiskopo de Parizo, ĉeestis kaj post la prediko de S-ro Kanoniko Puginier pri la Anĝela Saluto, dankis la fervojistojn katolikajn kaj gratulis ilin por ilia fideleco al la Kredo. Fine li donis sian benon.

Belega procesio fermis tiun memoran feston.

Socialistaj fervojistoj provis kontraŭmanifestadon antaŭ statuo de la Kavaliro de La Barre, starigita apud la Baziliko de Montmartre. Plena malsukceso. Partoprenis nur 50 personoj.

Max ROUB.

GRAVA AVIZO

Ŝanĝo en la Administracio.

La 10-an de Januaro S-ro SLEIJFFERS, la direktoro-administranto de la Akcia Societo „E. K.” sciigis al mi, ke li „tute kontraŭvole kaj kun sanganta koro” estas devigata ekŝiigi laŭ severa ordono de lia kuracisto. Jam delonge S-ro SLEIJFFERS estis malsaneta kaj mi antaŭvidis, ke iutempe li ne povos daŭrigi la E. K.-laboron, kiun li ĉiam faris tiel fervore kaj sindoneme. Ĉar vere, al E. K. li donis tutan sian liberan tempon, anstataŭ ripozi post la profesiaj laboroj dum la tago; kaj eĉ li oferis tre ofte la horojn de la nokto por nia kara afero, anstataŭ doni al siaj korpo kaj spirito la tiel necesan dormripon. Admonoj por esti singardema, por pli atenti la zorgindan staton de lia saneco, ne efikis. Li laboris, ĝis kiam la fortoj lin forlasis kaj ĝis kiam petegoj de lia familianoj kaj

ordonoj de liaj kuracistoj lin devigis, formeti ĉiun ajn laboron, por nur prizorgi la reakiron de lia sano.

Estas ne la plej malgranda trograndigo, sed la nura vero, ke li kiel administranto de E. K. faris gigantan laboron; la administraciaj aferoj estas nun ja tiel bonege ordigitaj, ke sen ia malfaciliĝo aŭ haltiĝo ili povas esti simple daŭrigataj de la nova administranto; kaj tiu ĉi eĉ nun spertos, kiom da laboro estas kunligita kun la administracia funkcio, kvankam nun ĉio estas bone aranĝita.

Mi ankaŭ ĉiam plej agrable kunlaboris kun mia estinta kolego-direktoro de E. K.; li estis ĉiam plej helpema, kaj se E. K. iom estas sukcesinta dum la lastaj jaroj, certe tiu sukceso grandparte estas efektivigita per la eksiginta administranto. Akceptu li nian koran dankon!

Kvankam la kuracisto verŝajne malpermesos al li ĉiun korespondadon, mi tamen jen donas lian nunan adreson (S-ro SLEIJFFERS, *St. Antoniusgesticht, en Bredevoort (Geld.) Nederlando*), por ke liaj amikoj, kiuj deziras tion, povu sendi al li signon de simpatio per vizitkarto aŭ poŝtkarto.

*
* *

Laŭ aprobo de la Prezidanto-komisaro de E. K.¹⁾ lia Moŝto F-ino M. BORRET, 21 Prins Hendrikstraat 21, Den Haag (Nederlando) bonvolis *provizore* funkcii kiel direktoro-administranto de E. K. F-ino BORRET estas konata samideanino, tradukintino de „Kie estas la Eklezio de Kristo”, kaj mi ne dubas, ĉu niaj legantoj kun ĝojo sciiĝos pri la nova administrantino de E. K. Ni ĉiuj kiel eble plej faciligu ŝian malfacilan kaj multlaboran taskon, por ke ni baldaŭ povu komuniki, ke F-ino BORRET, anstataŭ provizora, konsentu esti daŭra kaj definitiva administrantino.

D-ro SMULDERS.

Udenhout, 12 Januaro 1914.

¹⁾ Jen Art. 14 de la Statutoj de la Akcia Societo „E. K.” : „Okaze de malsano, foresto, potempa senoficiĝo aŭ alia malkapabliĝo „de unu el la Direktoroj, lia kolego-direktoro laŭpove plenumos „liajn laborojn; aŭ ili estas farataj de anstataŭanto potempe elektota de la Prezidant-komisaro.”

„. . . . Pri vakanteco definitive decidus la proksima ĝenerala „kunveno de akciuloj.”